# PoPola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO K ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25. VALENCIA (Hispanio)

## GENEZO DE MONSTRA PERFIDO

La monarkio en Hispanio estis iu tipa specimeno de feŭda reĝimo. Mizero k lukso, en kontrasto, estis blazono hontiga sub krono de reĝo frivola.

En aprilo de la jaro 1931.ª dum historia dato, la hispana popolo eniris en demokratan stadion per proklamo de la respubliko. Tiu renverso mirinde okazis sen elverŝo de eĉ unu guto da sango, en mezo de bruo tre ĝoja de kantoj k himnoj. Dum kelkaj tagoj, kun naiva entuziasmo k flirto kaprica de flagoj, la popolo estis mastro absoluta de stratoj k placoj. Tamen nek ia bloveto ekvekis la dormon de polvo centjara kuŝanta sur muroj imponaj de altaj palacoj k vantaj preĝejoj.

Anstataŭ ekzemplo de digno k eduko, tio ŝajnis, por la reakcio, kvazaŭ pruvo de stulto. Malaperis la timo, komencis la provoko, ekfunkciis la sabotado kontraŭ la respubliko, sistemo, kiu naskiĝis sub la signo de paco k harmonio. En la densa ombro de la samaj katedraloj k palacoj, respektataj de l' popolo, svarmis la susuroj pri abomenaj konspiroj de emfazaj nobeloj, riĉaj malsatigantoj, fieraj generaloj k dikaj episkopoj, kiuj miksis, en sankta alianco, la efikon de la mono, la sabro k la kruco, dum parlamento laŭ nova stilo prilaboris vigle modelan demokratan konstitucion.

En Aŭgusto 1932. la faŝismo montras sian bekon. Ekribelis, kun aliaj, generalo Sanjurjo. En la horo de la puno, oni pardonis la vivon, ankoraŭfoje! de ĉiuj kulpuloj. Kiel danko de friponoj, daŭris la manovroj en ĉiuj branĉoj de la ekonomio. Pluvadis mensogoj, floris la demagogio por akrigi la diferencojn inter la diversaj tavoloj de l' popolo. La semado donis siajn fruktojn en la parlamenta balotado dum novembro 1933. kio estis vera batalo jam inter ruĝo k blanko. La popola flanko, pro disiĝo, akiris multajn voĉojn sed malmultajn deputitojn, dum la reakcia flanko, pro unueco, atingis malmultajn voĉojn sed multajn deputitojn. Jen eble do miraklo!

Preskaŭ unu jaron ankoraŭ bezonis la reakcio por prepari la kapton de la ŝtato kun ioma ŝajno de normalo. Oktobro 1934! per si mem parolas tiu monato ĉar tiam, unuan fojon, la hispana popolo efektivigis la tekstojn de siaj himnoj per glora ribelo, havanta altan kulminon en la montoj de Asturio, je defendo de la libero kontraŭ la malrespublikana registaro de la respubliko.

Post tri semajnoj la reakcio povis venki nur laŭŝajne, per potencegaj rimedoj, ĉar viva flamo atendis avide horon k formon, en la koro de ĉiu honesta hispano.

Blovis ŝtormo tra Hispanio: detruo de leĝoj, sistema persekutado, rigora cenzuro, fermo de sindikatoj, financa diboĉado k danco de malpuraj negocoj...

En malfeliĉo oni lernas k neeble ja estis ne lerni profiti momenton kiam, pro videbla korupto, oni kunvokis por nova parlamento. Partioj k organizoj el proletaro k etburĝaro lerte algrupiĝis, kvazaŭ grajnoj de granato, en vasta organo politika nomata Popola Fronto prezentante al la ĝenerala opinio klaran programon kiel standardon de siaj devizoj k postuloj aprobendaj okaze de balota triumfo.

La 16. februaro de kuranta jaro, la hispana popolo, malgraŭ ĉiaj baroj, esprimis sian deziron aranĝi mem siajn proprajn aferojn. Granda sukceso! Kvankam provizore oni ŝtopis per balotiloj la faŭkojn de la hispana faŝismo, kiu perdinta la esperon pri venko laŭleĝa, tuj post la fiasko, interkonsentis kun sia internacia kolego, kiu ankaŭ suferis vundojn pro la batoj de hispanaj popolfrontanoj.

En punkto decida, kvin monatojn poste, ekflamaĉas la monstra' ribelo de generaloj perfidaj, kiuj serve al fremdaj interesoj, prononcante blasfeme la nomon de Hispanio por trudi sklavecon, senbridigis la terurojn de kruela civila milito por dronigi, en riveroj de sango, la rajtojn modestajn de bona popolo, kiu en tempo favora fluigis nek sangon nek larmojn k nun senhezite oferas la vivon por ke sia lando ne estu bastiono faŝista kontraŭ la digno aŭ kulturo de iu ajn alia nacio de la mondo.

## Verda Kurteno

Linio de fajro dividas abrupte, je du partoj ekstremaj, la amplekson de nia lando. Dum bleke parolas kanonoj, vomante detruon k morton, laŭ senkompata konkuro inter libero k abomeno, nenio honesta, nenio pura povas resti neŭtrala antaŭ tiel kruda dilemo.

Esperanto, nia lingvo bela, instrumento genia por homa progreso, ne povas ne helpi la vicojn popolajn per la forto morala de sia signifo aŭ per la efiko praktika de sia tutmonda reto.

Tial do ni, proletaj esperantistoj, idoj de sana popolo, post ne tro longa medito, decidis, kun juna humoro, mobilizi ankaŭ nian lingvon, kiel voĉon de alta idealo, por diskonigi, en samideanaj rondoj, la helajn konturojn de nia lukto, la firmajn trajtojn de aroga epopeo verkita per sango, ŝaŭmanta pro nobla kolero, de tuta la lando hispana.

Esperanto, elektinte sian lokon apud la humiligitoj kontraŭ la humiligantoj, ne nur plenumas decan rolon, sed ankaŭ per tio ĝi inaŭguras ebenan ŝoseon tra la smeraldaj kampoj de la ĉarma Hispanio, sub la protekto de ĉies respekto k ĉies estimo.

Post la venko, esperanto estos grava faktoro en la popola kulturo!

Sed unue, nun mem, nur unu celon ni havas: venki la faŝismon, gajni la militon! K estos ornamo ĝentila, de tiu nia arda sopiro, pro nia k via laboro, povi aŭdi iam, k eble tre baldaŭ, la dolĉan resonon de iu ajna voĉo diranta: «Se venkis la justo en monstra milito, tio ankaŭ ja okazis eĉ dank' al esperanto».

La ruĝo de flama pasio kun la verdo de persista espero, tiom nia!, estos certe la emblemo de via fakta internacia solidaro; de la frata kunhelpo de tiuj, kiel vi, celantaj transformi la mondon je unu granda rondo familia.

Al ĉiuj esperanto-organizoj, proletaj aŭ liberalaj, nian kolegan saluton!

Nia alpaŝo bezonas sugestojn, nia afero meritas subtenon. Laborante anonime atendas ni dume rikolton.

La trunko fortika de nia verda movado burĝonos printempe nur se la radikoj ricevas la sukon fluidan, en spongeca grundo, de ĉiu amiko portanta kun digno la verdan stelon sur jako.

Se nia voko ne trovas resonon. Se via respondo, anstataŭ ol vibri, silentas, tiam certe la trunko sekiĝos, pro manko de nutro, k venos kruela hakilo kiu teren faligos, kun bruo ĝemanta, la arbon de nia iluzio.

# La hispana virino en la fajro de la civila milito

La batalo kontraŭ la faŝistema milit-ribelo malfermis la vojon al la hispana demokrata revolucio. Revolucio, kiu mirigas la mondon pro la fervoro k kuraĝo de la hispana popolo k montras la mirindan kapablon de la hispana virino, kiu per la sama delikateco mastrumas la hejmon ol mortas sur la strato kun pafilo en la mano.

La faŝistemaj generaloj, kiuj per la perfida ribelo intencis kateni la popolon, atingis per tio la plenan liberiĝon de la hispanino, kiu, dum ĉi tiuj historiaj tagoj okupis postenon apud la viro.

Mi vidis tra la montoj de Aragono unu el ĉi tiuj virinoj kun siaj tri malgrandaj infanoj survoje al Barbastro. La edzo estas murdita, la hejmo k la vilaĝo, bruligitaj. El la tuta mizera havaĵo nur ŝi povis konservi la lanan korpokovrilon, ladkruĉeton k malmolan panpecon por la etuloj. Ĉe la vesperiĝo ŝi alvenos en la urbon, kie aliaj virinoj, tiel malgajaj k senkonsolaj kiel ŝi, akceptos la kamparanan vidvinon k lavos k nutros ŝiajn infanojn, kiuj tuj poste ekludos sur la strato kun aliaj knabetoj, nesciante la teruran tragedion, kiu ĉirkaŭas ĉiujn. Dume, ili, la virinoj, kies edzoj ankaŭ foriris al la fronto, eliros al la ŝoseo kun siaj kruĉoj plenaj de akvo aŭ vino k donos trinkon al la preterpasantaj soldatoj k milicanoj, kiuj, per grandaj ŝarĝaŭtomobiloj estas transportataj al la batalkampoj.

Ok virinoj alvenis al Lérida la 13-an de Septembro. Ili sukcesis forkuri el Sierra kaj el Luna. Kiam la faŝistoj okupis ĉi tiujn urbetojn la knabinoj estis malvirgigataj k al iliaj patrinoj oni senharigis la kapon. Nur tiuj ok virinoj povis eskapi post tiu turmento. Konate ja estas, ke la plej ŝatata ornamo por la hispanino estas la hararo.

«Ni ne deziris tion, sed la faŝistoj faris de ni soldatojn k kiel tiaj ni luktos ĝis la haro ree kovros nian dorson».

En la montaro de Guadarrama mi parolis kun la junulino Konĉita, el Toledo. Ŝia fianĉo falis sub la fajro de la maŝinpafiloj. Ŝi venis k petis armilon. Preni k celi kontraŭ la malamikon la maŝinpafilon, kiu mortigis sian amaton, tio estas nun ŝia tuta ambicio.

En la 5a Regimento de la Popolaj Milicoj, kamaradino Juanita, gvidas la komplikan servon de la provizumado k respondas kun mirinda precizeco milojn da demandoj k petoj.

Lina Odena (*), Aurora Arnáiz, bravaj komjunulinoj, kun siaj bluaj bluzoj k la pistolo ĉe la gracia zono, komandas konsiderindajn kolonojn k organizadas milojn k milojn da gejunuloj por defendo de la libero.

Viktoria Kent, fervora respublikanino, plene sin dediĉas al la organizado de porinfanaj gardejoj, vartejoj k kuracejoj k ankaŭ al la provizado de lakto k ludiloj por la infanoj, kies gepatroj falis aŭ luktas ankoraŭ en la fronto.

Plena de energio, Maria Karrasco, laboristino en la aerodromo de Kuatro Vientos, ŝmiras per oleo la maŝinojn laborante la tutan tagon inter motoroj, k ne permesante la foriron de unu sola aviadisto sen ekzameni ŝi antaŭe ĉiujn ŝraŭbojn de la aviadilo.

La konata kantistino Estrellita Kastro sonigas siajn trilojn tra la batalkampoj inter la muskolaj servantoj de la peza artilerio.

Maria Teresa León, talenta verkistino, ridetema elsaltas de nia aŭtomobilo sur la ŝoseo de Talavera k kun ŝercoj k petoj haltigas la gigantajn kamparanojn, kiuj pro manko de kutimo, forkuras frenezigitaj antaŭ la aeratako de la aviacio k revenigas ilin al la fajrolinio.

Dolores Ibarruri, kiu, el la mizeraj domaĉoj de la ministoj, kie ŝi naskiĝis, sin levas potenca k gvidas ĉi tiun popolamasan batalegon.

Marina Ginestá, la malgranda katalunino, mia ĝentila sekretariino, filino de tajloro en Barcelono. La 19. de Julio, tre kune kun ŝiaj frato k fianĉo, ŝi prenis la fusilon k sin direktis al la barikadoj de la placo de Kolumbo. La fianĉon mortigis kvar kugloj ĉe la ventro. La frato foriris al Zaragozo. Marina okupiĝis poste kiel skribmaŝinistino en la Stabo de la fronto. Ofte ŝi sidas ĉe angulo, kontraŭ la muro k kiam mi ŝin alparolas ŝi respondas jene:

«Al vi, kiu estas rusa kamarado, mi povas paroli sincere: ni ĉiuj estas tre sentimentalaj. Granda malhelpo! Ni estas treege sentimentalaj!...

Ĉio ĉi estas la hispana virino, kiu, dum ĉi tiu grava horo de popola lukto montris sian veran karakteron.

La nobelaro k pastraro hispanaj prikantis al ni dum jarcentoj «la virton k belecon de la hispanino»; sed, mi povas certigi, ke ĝis nun ni ne konis la veran k aŭtentan hispanan virinon. Same kiel ni povis koni nun la nobelojn k junkrojn, kiuj donis pruvojn pri sia kavalireco turmentante la edzinojn de la kontraŭfaŝistojn, murdante ilin per ŝtonĵetoj sur la publikaj placoj de la vilaĝoj. Kompatindaj virinoj, kiuj faladis kun la infanoj en la brakoj!

En Puente Genil, en la provinco de Kordovo, la katolikaj faŝistoj post la kutima malvirgigo al la virinoj, enigadis siajn bajonetojn en iliajn brustojn k ĵetadis la disŝiritajn korpojn en la riveron.

En la Alkázar de Toledo, ĉi tiuj kavaliroj lokigis sur la altaj etaĝoj de la fortikaĵo la kaptitajn virinojn por ke iliaj korpoj taŭgus kiel parapeto kontraŭ la obusoj...

Sed, malgraŭ la multaj suferadoj, la hispana virino—patrino, edzino, fratino, fianĉino—alvenos al la finvenko, al la vivo nobla k feliĉa. Ĉi tie oni estas plene konvinkita pri tio; k kiam oni serĉas certigon al tio, ĉies okuloj turniĝas sur la vivon heroan k gloran de la soveta virino. Pro tio, miloj k miloj da okuloj elradiis pro fiero k ĝojo en la kunvenoj de la antifaŝistaj virinoj kiam alvenis la sciigo pri la helpo, la unua virina helpo el fremdlando, tiu de la laboristinoj el Moskvo, el la lando de l' Sovetoj!

M. KOLTSOF

(*) Heroe mortigita, post la verkado de ĉi tiu artikolo, sur la fronto de Granada.

**► La hispana popolo preferas morti stare ol vivi genuflekse! ◄**

# Trafaj vortoj de la Nacia Prezidanto

Per ĝustaj k precizaj vortoj, S-ro. Azaña estas difininta trafe la veran signifon de la hispana tragedio. Li, dum intervjuo kun ĵurnalisto, deklaris.

> «Ne temas ĉi tie nur pri enlanda malakordo. En ĉi tiu ŝajna intercivitana milito estas en diskuto, krom la libero de la hispana popolo, la ekvilibro de la fortoj en la Mediteraneo, la kontrolo de la markolo Gibraltar, la utiligo de niaj militŝipaj bazoj en la Atlantiko k ankaŭ tiu de l' krudaĵoj abundaj en la subgrundo hispana.
>
> Jen la kaptaĵo, kiun oni pridisputos en la daŭro de la unua akto de ĉi tiu nova granda milito.»

En mallongaj vortoj, jen estas la tuta graveco de la lukto sangopleniganta Hispanion. Ĝi ne estas ja milito inter du grupoj de hispanoj. Ĝi estas drameca batalo inter la hispana popolo k grupo de perfidaj generaloj, sinvendintaj al la oro de la faŝista imperialismo. En la venonta mondmilito—kiun la pacema volo de la grandaj eŭropaj Demoratioj povos apenaŭ prokrastigi kelkajn monatojn, sed ne malebligi ĝin—la malamikoj de la libero bezonas la partoprenon de Hispanio; ili bezonas disponi pri ĝiaj mineralaj k agrikulturaj produktoj, k ili—super ĉio—bezonas ĝiajn bonegajn aerŝipajn k militŝipajn bazojn, superregantaj la Mediteraneon, povantaj esti utiligataj kiel apogpunktoj por definitivaj agadoj kontraŭ Anglio k Francio.

Se la hispanaj faŝistoj batalus izolaj; se malantaŭ ili ne starus helpante ilin per homoj, armiloj k mono, kelkaj fremdaj potencoj, jam de antaŭ longe la popolo estus venkinta la ribelon. Sed malantaŭ Mola k Franco —ilin gvdante pli ol ilin helpante— staras la eŭropaj imperialismoj. La faŝismo ĝuste taksis la valoron de la superregado en Hispanio por la sanga batalo, kiun ĝi baldaŭ senkatenigos. La faŝismo do, klopodas k penas subpremi la hispanan popolon, ĉar ĝi estas certa pri tio, ke «Madrido—laŭ esprimo de Andreo Malraux—estas la plej rekta vojo por alveni Parizon.»

En la hispana lukto, oni diskutas la sorton de l' mondo. Venkinte la faŝismo en nia lando, Francio, ĉirkaŭita en ĉiuj landlimoj, ne malfruus fali sub la germana *nazi*-ismo. Sovetio, Britio k la malgranda Alianeo ne plu povus rezisti. Bedaŭrinde, nek Francio nek Anglio ŝajnas kompreni la danĝeron, kiu ŝvebas super ili. La timo provoki la neeviteblan katastrofon, ŝanceligas ilin, kiel en la kazo de Abisenio. Tempo perdiĝas en senfinaj paroladoj. Intertempe, la faŝistaj staboj intense agadas. Nur Sovetio komprenis la veran gravecon de ĉi tiu momento. La aliaj landoj ne volas konvinkiĝi, ke ĉiu cedo estas nova instigo por la faŝistaj potencoj.

Primeditu k decidu rapide la eŭropaj Demokratioj, la sekvendan vojon; ili ne ignoru, ke se la hispana popolo estus venkita, la proksima viktimo de la internacia faŝismo estus Francio.

**KOMENTARIOJ**

# AL ĈIUJ

Kiu vere k sincere sentas esperantismon, kiu studis nian lingvon ne nur pro scivolo aŭ distro, kiu venis al esperantismo serĉante ilon por homa interkomprenigo, kiu celas al la plirapidigo de la evolua progreso de la homaro, kiu celas iel ajn al plej perfekta sociordo, tiu rajtas vere sin nomi «esperantisto», k konsekvence estas devigata taksi ĝuste la gravecon de la homa digno k de la libero.

Nur malmulte da esperantistoj sin kredas tiaj, malgraŭ ke ili nur uzas esperanton kiel ilon por amuzo, por kolekti diversaj aĵojn, por utiligi esperantajn servojn okaze de vojaĝo, k. t. p., sed ili ne antaŭenpuŝas esperantismon, nek progreson.

La plimulto da esperantistoj estas pioniroj de la IDEALO, k ili venis, pli aŭ malpli konscie, al niaj vicoj, por sin meti je la servo de la progreso de la homaro.

Tial ni supozas ke la esperantistoj havas ĝustan koncepton pri la homa digno kaj libero.

Ĉiuj luktoj de la homoj okazis ĉirkaŭ tiuj esencoj de la vivo; ĉe la kerno de ĉiuj historiaj bataloj staris grava peno por konservo aŭ por akiro de libero aŭ homa digno.

Nia hodiaŭa batalo ne povas malhavi tian entenon k la esperantistoj ne rajtas ignori tian aspekton de la lukto.

Kiel diris fama kunbatalantino, «ni hispanoj, preferas morti starantaj ol vivi surgenue». Ni starigis tute pace novan demokratian reĝimon; la Respubliko; per ĝi ni akiris pliperfektigon de niaj homaj rajtoj. Poste, la Popola Fronto atingis per baloto gravegan plimulton da deputitoj k konsekvence elektis demokratian registaron.

Sed la reakciaj fortoj de la lando, la granda kapitalismo k la eklezio, helpataj de la profesiaj militistoj, havas specialan koncepton pri la homa digno, kaj preferis uzi perforton; ili ribeliĝis celante trudi al ni sian kapricon. Tiaj uloj tute ne akceptas demokratajn decidojn, se ili ne estas favoraj al siaj privataj interesoj; ili ne rezignas siajn privilegiojn k defendas ilin per la armiloj de la popolo, perfidante la solenan ĵuron pri fidelo al la Respubliko. Tia estas ilia koncepto pri la homa digno.

Post la starigo de la respublika reĝimo aperis en nia lando la libero kiu forestis dum la antaŭaj jaroj, la diktatorecaj jaroj, kiam ĉiuj liberoj estis malpermesataj; k la reakciuloj profitis tiun liberon por la preparado k organizado de la nuna atako kontraŭ la libero. Se ili venkus, jam ne plu estus libero en nia lando.

Pro la nunaj politikaj cirkonstancoj de la mondo, precipe de Eŭropo, pro la helpo kiun la ribelintoj ricevis kaj ricevas de la faŝistaj landoj, k pro la aktuala situacio de la lukto inter faŝismo k demokratio, nia batalo ne estas privata afero k ĝiaj konsekvencoj trafos ĉiujn. La rezulto de nia milito nepre kuntrenos ĉiujn, ĉu al sklaveca reĝimo, ĉu al libera demokratio.

Jen kial ĉiuj esperantistoj, ĉiuj veraj k sinceraj esperantistoj, ĉar ili estas dignaj homoj, devas subteni la hispanan popolan fronton. Ni estas certaj ke antaŭ dilemo, faŝismo au demokratio, la esperantistoj tuj decidos kion fari; kaj kun energio, rapideco k batalemo partoprenos en la nuna batalo por ĉies digno k libero, sendante moralan k materian helpon kiu permesos atingi, kiel eble plej baldaŭ, la definitivan venkon, kiun ni bezonas je la servo de l' Homaro.

## Nia tasko estas via

# EKZEMPLO

Antaŭ ol komenci la atakon al la urbo Oviedo, oni disĵetis per aviadiloj, proklamojn el kiuj ni eltiras fragmenton:

**«Al la loĝantaro.**

Via hodiaŭa tragedio estas la sama ol tiu de aliaj urboj de Hispanio, sangoplena pro la frenezo de armeanoj ambiciaj k senkoraj. La malgaja spektaklo de via doloro estas ĝusta vidaĵo pri la estonto, kiu atendus vin se la militista faŝismo venkus. Tiu okaze, ne plu ekzistus trankvilo fruktodona por la subpremata hispana popolo. Pli kruela milito sekvus tiun ĉi. La sangavideco de la militismo neniam sin sentas sata.

Ni, la milicanoj de la lojala armeo venas savi vin k viajn filojn. La venko de la Registaro de la Respubliko estas triumfo de la Paco k de la socia Justo k nur sub ĝia regado vi vidos foriĝi la terura fantomo de la milito.

Timu nenion de la Armeo de Asturio. Ni estas ja viaj propraj fratoj, kiuj venas savi vin de la militista jugo, La soldatoj trompitaj, la gvardistoj falintaj en malesperon, ĉiuj vi, humilaj klasoj k oficiroj, vendantaj vian sangon, perfide ekspluatataj pro iu falsa kredemo, revenu al via tradicia lojaleco. Vin vokas Hispanio per la lasta patrineca krio. Via sango estas ties larmoj. Aŭskultu ĝin k kiam vi malesperos, fidu al ĝi k venu al la vicoj de ĝiaj lojaluloj, ĉiam malfermitaj por la sinceraj pentantoj».

* * *

Tiamaniere agas la marksistoj k iliaj kunbatalantoj. Kiam vi aŭdos aŭ legos pri la kruelaĵoj de la «ruĝuloj», vi ja povos dece respondi, ke per tiuj kalumnioj la faŝistoj celas vuali siajn abomenindajn krimojn.

# SOVETIO!

Ektremoj de ĉiuj malavarecoj en unu sola; sankta fervoro proletara; potenco timinda kaj nekomparebla; vibrado senĉesa de ĉiuj la nervoj antifaŝistaj; forĝejo de Justeco, fandejo de Egaleco: SOVETIO! Ni vin salutas, patrio de la tutmonda proletaro! Pro via honesta agado! Ni vin salutas kun koro tremanta! Hispanio vin salutas, kabano kamparana, hejmo civitana de l' lando proleta, kiuj kunvivas niajn horojn dramecajn! Ni vin salutas, Soveta Unio, kies bruston vi malfermas al la, de l' faŝistoj, sieĝataj landoj. Soveta Unio kies profunda doloro estas la doloro de Hispanio, kies larmoj estas la larmoj de la tutmonda laboristaro, kiu hodiaŭ tremas pro sankta kolero, pro sankta indigno, pro sankta malamo...

Sovetio, al vi kiu konis, kiel ni, ĉiujn frapojn, ĉiujn turmentojn de la caraj jaroj, al vi ni esperas, al vi ni rigardas, k al vi ni sendas avide k varme nian plej koran saluton!!



**En la mondon venis nova sento**
**Tra la mondo iras forta voko**
**Per flugiloj de facila vento**
**Nun de loko flugu ĝi al loko.**

# ZIGZAGO

Tuj post la komenco de l' milito, la faŝistoj kreis grandegan k konstantan blufon, per kiu invadis la tutan mondon kun ridindaj k malveraj sciigoj.

La faŝistaj radiostacioj poluras ĉiutage la plej strangajn mensogojn. Tre ofte iu ajn basa voĉo misuzas la radion per disaŭdigo de stultaj minacoj k cinikaj insultoj.

En ĉi tiu rubriko aperos skizaj komentoj pri diversaj nuancoj el tiuj informaĉoj.

—

Iu radiostacio anoncas ke ni faras specialan eldonon de niaj gazetoj por sendi al ĉiu fronto la eldonon kiu montras sukcesojn ĉe la aliaj frontoj.

Kaj oni batalas per pli ol dudek diversaj frontoj!

Tial ne estas senlaboruloj ĉi tie!

—

La Balearaj Insuloj, Maljorko k Ibizo, estas regataj de la itala grafo Rossi k tie estas aeroplanoj, soldatoj k militŝipoj italaj.

La italaj k hispanaj faŝistoj kunlaboras gaje k amike.


Ne vortoj sed faktoj valoras!

—

Radio Tenerife anoncas ke la urbo San Sebastiano havas nun la duonon da enloĝantoj ol antaŭ la komenco de la ribelo.

Male ĉe la urboj, kiuj ne atingis la feliĉon esti regataj de la faŝistoj, duobliĝis la nombro da enloĝantoj.

Kuraĝiga fakto! La faŝismo vere allogas la popolon!



**TUTMONDA SAMIDEANARO!**

**Nia venko estas garantio de via libero k paco. Starigu do tuj en via urbo Esperanto-komitaton de amikoj de popola Hispanio! Sciigu nin pri via plano k laboro!**

**GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA**
**Mar, n.º 25—VALENCIA (Hispanio)**

**Esperanto estas nun paca batalilo por la justo k libero**

# Postgvardia Fronto

Se la batalfrontoj havas intereson dum la lukto kiu furiozas sur la hispana tereno jam de antaŭ tri monatoj, ne malpli da gravo havas la laboroj kiujn oni efektivigas en la malantaŭgvardio; laboroj, kiuj celas atingi la plejon da bonstato, tiom morala kiom materia, por la kamaradoj kiuj luktas kun armiloj kontraŭ la faŝismo.

En la vilaĝoj, kie pro ilia malproksimeco, oni ne ekaŭdas la resonegon de la kanonoj, nek la senĉesan pafadon de la mitraliloj k de la pafiloj, oni laboras febre por provizi la Popolan Armeon. La generalaĉa ribelo surprizis la proletaron dum laboro, k tamen, la popolo per sia ĝusta koncepto de la grando k daŭro de la civilmilito, kapablis, en la unuaj momentoj, plenumi la devon de aranĝoj pure militaj, kiaj estas Intendantaro k Sanistaro, al kiuj la armeo, kie ne ribelinta tute malordigita, ne povis plenumi la zorgojn, kiujn oni ordonis al ĝi. Jam forpasintaj la unuaj momentoj de surprizo, ĉiuj demokrataj partioj grupiĝis por kune solvi aferojn tiel necesaj k neprokrasteblaj kiel la provizumado al la diversaj batalfrontoj. Spontanee oni estas kreinta karavanojn de ŝarĝaŭtomobiloj ĉiutage serpentumantaj tra larĝaj vojoj por la transporto de l' nepre necesaj varoj por niaj kuraĝaj proletoj k soldatoj. Kaj tio ne estas ĉio, ankaŭ estas disponigitaj multnombraj ŝarĝaŭtomobiloj por ambulancaj apotekoj, vunditejoj, k vetursalonoj por kirurgintervenoj, ĉu lokitaj sur aŭtomobiloj aŭ sur vagonoj, kio permesas la kooperadon de tiuj sanigaj branĉoj sur la sama batalfronto, kun la celo ke la plej danĝere vunditaj kamaradoj ricevu kiel eble plej rapide la plej efikan zorgon.

Rapida transformiĝo spertis la industrio; dum kelkaj tagoj ĝi alkonformiĝis al la bezonoj de ĉi tiuj momentoj, k la teksfabrikoj laboras senripoze por alprovizi krudajn varojn al la larĝaj kudrolaborejoj, kie oni pretigas vestaĵojn por niaj batalantoj. Same la metalindustrio transformiĝis, laŭ ebloj, en milit-industrio k oni laboras febre por la fabrikado de bomboj, mitralo, kugloj k ceteraj militiloj.

Tiu estas la materia aspekto de la postgvardia laboro, ĉar estas alia kiu permesas, ke la moralo de niaj soldatoj ne ŝanceliĝu nek unu momenton. Tiuj, loĝantaj kiel ni en la orienta flanko de nia duoninsulo, povas aserti kun kiom da amo la ĉi-tiea popolanaro akceptis la rifuĝintajn proletojn, kiuj forlasis siajn domojn detruitajn sub la monstraj piedegoj de la hordoj de l' faŝismo. Miloj k miloj da infanoj, virinoj k maljunuloj venis en la orientajn regionojn, kie ili trovis novajn domon k amon flanke de la loĝantaro, per kio ili forgesas parton de la malfeliĉoj okazintaj ĝis sia alveno al la lojalaj provincoj.

Estas familioj kiuj suferis sian forkuron piede k kun la premo de malsato k soifo; ili marŝis nokte pro la timo fali sub la premon de l' faŝisma kruelego. Multaj el ili estas perdintaj la edzojn, la patrojn... kaj iliaj domoj estas ĝisfundamente detruitaj, nur pro tio, ke ili estas respublikanoj aŭ socialdemokratoj.

Popolo, kiu ribelas armite kontraŭ la mortiga faŝismo pretendanta rabi ĝian liberon k kiu ĉiutage skribas heroecajn epopeojn ne povas esti venkita nek sklavigita k marŝas per malrapida sed neŝancela paŝo al la venko.

Gloron por la liberdefendantoj, kiuj falis en kontraŭfaŝisma batalo! Vivu la demokratia Respubliko de Hispanio!

Oktobro 1936.



## HEROA SAMIDEANO

**K-do Julio Mangada, fervora esperantisto, demokrata homo, militisto pacema, dum paco, sed brava kolonelo kiam la libero de l' popolo estis en danĝero. La kolono kiu luktas sub lia komando rikoltis sukcesojn kun signo de gloro. Sur la batalkampo mem la milicanoj aklame elektis lin generalon.**

**Lia figuro estas grava simbolo por ni, esperantistoj, ĉar la nomo de nia lingvo floras ĉe miloj k miloj de lipoj hispanaj konstatinte jam, per lia ekzemplo, ke esperanto ne estas utopio nebula sed karno k histo de suferanta popolo.**

**Sinceran saluton tre flaman al li!**

# Kamarado!

Nia bulteno POPOLA FRONTO, aroganta krio al la tuta mondo, aperas nur je niaj propraj rimedoj. Kuraĝa entreprenemo k arda deziro ke esperanto estu juna heroldo de afero grandioza, instigis nin eldoni la foliojn kiuj nun ricevas la kareson de via rigardo.

Ni ĝojas liveri senpage nian organon al ĉiuj amikoj, kiuj povos, kiel abelo el floro, ĉerpi utilon el ĝia materialo per traduko por amasa legado aŭ aperigo en demokrateca gazetaro.

Tamen ni esperas ankaŭ vian subtenon, per eĉ plej eta alsendo de mono, kiun ni ricevos emocie kiel instigon k aprobon vian al nia laboro. En ĉiu numero ni kvitancos la donacojn. Sendu rapide, tuj!, la poŝtmandatojn laŭ jena adreso.

ANTONIO PONT
Plaza Republica, n.° 2, VALENCIA (Hispanio)

**AŬSKULTU RADIODISSENDOJN DE VALENCIO PRI HISPANA SITUACIO EN ESPERANTO!**

Stacio de Komunista Partio—ondlongo 41,87 metroj—marde k vendrede je la 17[a] horo (hispana tiempo)

Stacio de Socialista Partio—ondlondo 41 metroj—lunde k sabate je la 12[a] horo (hispana tiempo)

## Manifesto al la legantaro

Kvazaŭ blinde ni elektis la adresojn, el diversaj fontoj, por la alsendo de ĉi tiu unua numero de POPOLA FRONTO. La tasko estis sufiĉe malfacila ĉar temis trovi, en ĉiu urbo kie esperanto vivas, almenaŭ unu amikon, kiu akceptus, kun plaĉo k bona volo, kunlabori en nia entrepreno. Ni sendas, iom hazarde, eĉ al gravaj lokoj nur unu aŭ du ekzemplerojn. Via konscienco devas mezuri do la sekvojn pri konvena aŭ malkonvena uzo, en viaj manoj, de nia bulteno.

Multaj adresoj eble jam kadukiĝis. Tial ni bezonas nepre, ke almenaŭ unu fojon, ĉiu ricevanto de ĉi tiu numero, sendu al ni simplan poŝtkarton sciigante la ricevon kun indiko pri opinio k eblo, rilate laboron, en sindikata, laboreja aŭ ĵurnalista medioj. La nericevo de tiu poŝtkarto signifas malaprobon al nia celo aŭ nedeziron akcepti la duonmonatan viziton de nia gazeto. En tia okazo ni forstrekos vian nomon de nia sliparo. Nepre atentu do ĉi tiun averton.

Al ĉiuj ceteraj, k eĉ pliaj, amikoj plenumantaj tiun kondiĉon akurate ni liveros la gazeton. Via devo estas kunlabore helpi la hispanan popolon disvastigante ĉiel ajn la enhavon de POPOLA FRONTO, ne forgesante ankaŭ pri la fakto, ke la bulteno aperas nur je riskoj de malŝvelinta poŝo de malriĉaj laboristoj. Serioze ni faras al vi sugeston: se ĉiu kara leganto de nia bulteno forsendus al ni, unu fojon, la cendojn, kiujn eble li elspezas por glaso da biero aŭ skatolo da cigaredoj, nia POPOLA FRONTO povus esti aperinta regule, k eĉ ankoraŭ multe pli bele, preskaŭ unu jaron. En ĉiuj grupoj, sekve, devas cirkuladi listoj en tiu senco.

Sendu la monon prefere per bankbiletoj aŭ ĉekoj en valorigita koverto, sed ankaŭ ni akceptos respondkuponojn aŭ poŝtmandatojn!

Sendu gratulsalutojn k la gazetojn aŭ ĵurnalojn kun tradukoj al nia POPOLA FRONTO! tiun materialon ni uzos por daŭra ekspozicio k por informado en urba, regiona aŭ nacia ĵurnalaro. Pruvu ni ĉiuj, ke esperanto estas la plej utila aparato por la modestaj klasoj! Via mono, via laboro, via sindono, via fervoro, samideanoj, kamaradoj el ĉiuj landoj, amikoj sinceraj de Hispanio, estas municio, efika kiel kuglo, en nia batalo pri vivo aŭ morto!

Memoru konstante, en ĉiu momento, dum ripozo aŭ distro, niajn adresojn.

| Por sendi monon | Por ĉio alia |
|---|---|
| **ANTONIO PONT** | **POPOLA FRONTO** |
| Plaza Republica, n.° 2 | Mar, n.° 25 |

**VALENCIA** (HISPANIO)

# MISKOMPRENO

Jen tio, kio karakterizas la konduton de la demokrataj ŝtatoj en Eŭropo, rilate al la batalado de nia popolo kontraŭ la perfidaj armeanoj ribelintaj. Necesas do, ke ni klopodu informi la eksterlandanojn pri la signifo k pri la celo de nia lukto.

Niaj malamikoj sukcesas havigi al si ĉian helpon ĉe la reakcia gazetaro tutmonda. Subaĉetante ĵurnalistojn k ĵurnalojn k eĉ radiostaciojn en la demokrataj landoj,— ĉar en la faŝistaj ili ja povas ŝpari monon,— ili disvastigas mensogojn por misorienti la naivulojn.

La internacia reakciularo posedas reton de iloj metitaj je la dispono de la hispanaj faŝistoj. Eĉ gazetoj kun demokrata karaktero estas posedaĵo de reakciuloj. Tial do, la amasoj ofte estas informataj partiece. Rekte aŭ malrekte, la demokrataj legantoj ĉiam riskas esti trompataj per la ĉiuspecaj rimedoj per kiuj la vero povas esti kaŝata. Per hipokritaj procedoj, lerte uzataj, oni prezentas la faktojn kripligitaj aŭ inversigitaj, ĉar la celo de ĉiu konservemulo, estas ŝajnigi, ke li estas «neŭtrala» raportisto.

Nur la proleta klaso, unuflanke ĉar ĝi posedas k legas sian gazetaron k aliflanke pro instinkto kiam ne disponas je propraj informiloj, bone scias, ke la laboristoj hispanaj estis malfidele atakataj de senhonoraj armeistoj en la servo de la katolika eklezio, kies episkopoj k monaĥestroj posedis fabelajn trezorojn dum la simplaj pastroj en la vilaĝoj malsatis; en la servo de la nobelaro, dekduo da grandbienuloj posedantaj la duonon de la nacia teritorio dum la kamparanoj vivis ekspluatataj kiel en feŭda epoko; en la servo de senskrupulaj negocistoj kies komanditantoj estis la plej koruptaj politikistoj. Mallonge, en la servo de privilegiaj tavoloj k en la servo de siaj propraj privilegioj.

Sed ni dubas ĉu la neproletaj demokratoj bone komprenas nian lukton. Eĉ la plimulto de nia diplomataro perfidis nin k tiu ĉi fakto multe helpis al konfuziĝo de konsciaj homoj k igis ilin dubi pri la praveco de nia revolucio, naskiĝinta el la ribelo.

La internacia faŝismo ludas ĉefan rolon en la nuna milito en Hispanio. La batalo ĉi tie estiĝas inter Faŝismo k Demokratio. Zorge atentu la demokratoj pri la signifo de nia batalado. Se ili restus indiferentaj al finrezulto de nia milito, ne nur ni, hispanoj, bedaŭrus la venkon de la faŝismo.

Ne kredu la malveraĵojn, dissemitaj de certa Presaĵaro, eĉ se ĝi aspektas demokrata. Ne fidu al la informoj de certaj radiodissendoj. En Hispanio ĉiuj kontraŭfaŝistoj batalas kune, de la moderaj respublikanoj duonburĝaj, kun la Prezidanto Azaña, ĝis la anarkistoj, ĉiuj streĉe ligitaj por la sama celo: Venki la faŝismon!

## Lasthora Impreso

La saĝa komprenemo de niaj legantoj devas scii, ke nia bulteno ne povas informi pri freŝaj okazintaĵoj en la frontoj. Tio apartenas al la ĉiutagaj ĵurnaloj, kiujn oni legas ordinare en sia propra urbo. En ĉi tiu rubriko ni faros nur skizan komenton.

La videbla tre fanfarona intenco de la faŝista armeo estas sieĝi Madridon, sprita ĉefurbo, kiu sciante la intencon pretiĝas amasege, kun helpo de ĉiuj aliaj regionoj, respondi adekvate la provokon. La plej malfacila flanko de nia lukto estis, ĝis nun, la manko de taŭga armilaro. Nun jam nia situacio estas alia, dank' al tio la situacio en la frontoj baldaŭ fariĝos pli hela, pli definitiva por nia afero.

## BALBUTO DE NOVA EKONOMIO

En venonta numero ni publikigos interesan artikolon, kun objektiva studo pri ekpruvoj por nova organizado de la ekonomio en Katalunio k Valencio.

### NIA POPOLA LETERUJO

Al kelkaj.—Vi jam vidas, per nia gazeto, la plenumon de viaj deziroj. Ni atendas la sekvojn jam. Nun ek' al la laboro!

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33. Valencia

JARO N.° 2 DUONMONATA ESPERANTO - GAZETO 15 NOVEMBRO 1936

# Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO K ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)

## LA NOVA HISPANA REGISTARO

Antaŭ nur kelkaj jaroj, kiam la vulkano ankoraŭ muĝis surde interne de la monto, en Hispanio, kiel ĉe aliaj landoj, sed ĉi tie pli akre, estis motivo por bruaj polemikoj k eĉ batoj, inter diversaj branĉoj de la proletaro, tre varma disputado pri la rolo k signifo de la ŝtato k ties plej videbla organo: la registaro. Dolora sperto, en la popolo, vidi la ŝtaton—aparato je la servo de la superuloj—sub formo nur de avida bestego, neniam sata je impostoj k soldatoj, faris sufiĉe malfacila la taskon klarigi, antaŭ popolamaso, la eblon ke tiu sama reganta potenca instrumento ŝtata, povus esti iam fakta k vera direktilo de l' popolo por efektivigi ĝiajn revojn k iluziojn. Tro simpla koncepto pri tiu afero ne permesis scii eltiri la diferencon, kiu ekzistas inter reakcia registaro k demokrata registaro.

La parto de l' popolo, plej obstina k neskuebla sur tiu principo, estis en Hispanio la grava Nacia Konfederacio de Laboro, sindikatara centro kun certa enhavo de anarkista doktrino k larĝa influo en laboristaj industriaj medioj ĉe oriento k sudo de nia lando. Tiu organizo tute malakceptis, ĉu rekte aŭ malrekte, la intervenon en politiko, per nepra rifuzo de siaj gvidantoj akcepti ŝtatajn postenojn, k insista metoda rekomendo al siaj membroj tute ne partopreni en ĉiu ajna balotado.

Tuj post la balota triunfo de la Popola Fronto, kaptis la gvdilojn de la nacia politiko, demokrata registaro, kiu kvankam, laŭ intenco, vere reprezentis la tutan popolon, fakte, pro sia konsisto, estis nur aglutino tro disa de respublikaj partioj. Kiam tiu grupo da ŝtatestroj, kirasitaj per la mola defendilo de klasika liberala teorio, ekpruvis heziteme meti la fingron sur la vundon, bruege falis muroj k tegmentoj de la fantazia palaco de interklasa harmonio. Eksplodis la bombo zorge preparita de tiuj emfaze parolantaj buŝplene pri ordo k disciplino. Krevis la mensogo de falsa honoro. Ŝiriĝis la trompa vualo de ŝajna obeemo al la leĝa rajto de densa popola plimultego.

Antaŭ tiel furioza uragano, la veloj de la ŝtata boato tre urĝe bezonis la manojn fortikajn de la proletaro, kiu kun plena respondeco, pere de siaj politikaj organoj, plifortigis la stabon de la kontraŭfaŝista batalo per eniro en la registaron de ok ministroj: ses socialistoj k du komunistoj. Tiam ankoraŭ la Nacia Konfederacio de Laboro, malgraŭ invito, ne volis akcepti la rektan alpaŝon en la registaro, sed oni povis kalkuli jam, laŭ publika deklaro, pri ĝia eksterministra kunlaboro.

Tiu popola registaro naskiĝis kun la prezido de Largo Caballero, gvidanto de la Ĝenerala Unio de Laboristoj; post la injekto daŭris la milito, kun plia potenco, sur kampoj ebenaj k montoj abruptaj, sur ondoj de l' maro aŭ en mezo de aero libera. Daŭris ankaŭ la farso de tiu Londona Komitato, kies hipokrita sinteno estis masko facila por helpo senhonta al hispana faŝismo, fare de la fremda imperialismo. Dank' al tio la hordoj de la tiranio premadis intense. La demokratio estis certe en grava danĝero pro minaco al Madrido, sprita ĉefurbo de la Respublikol

Estis necese fari lastan penon, faskigi ĉiujn fortojn sub unu sola komando, en fera disciplino por unu sola celo: fortranĉi la gorĝon de la drako ĉe la sojlo mem de la ĉefa citadelo. Konvinkiĝis jam pri tio, finfine!, la adeptoj de la kontraŭŝtata skolo k, unuan fojon en sia historio, la Nacia Konfederacio de Laboro, ĵetinte en forgeson malnovajn antaŭjuĝojn eniris honore, solene, kun kvar ministroj, en la registaro por montri publike al la mondo, ke la nova supera aŭtoritato estas la unua k sola, ĝis nun, registaro de Hispanio, kiu reprezentas ĉiujn tavolojn sociajn de urboj k vilaĝoj.

Gvidantaro tutpopola, kerno de venko k gloro, kiu, postulinte obeon, garantias panon kun digno, laboron sen laco k vivon feliĉan sen zorgo!

## Solidara Sento

La subita apero de nia bulteno, sur la brila horizonto de nia verda mondeto esperantista, ricevis nature familian saluton ĉe la proleta etaĝo sed por ni estas tre interese konstati, ke la nasko ankaŭ ĝuis rapide kortuŝan akcepton, kvazaŭ kruĉon da freŝa pura akvo por soifanto, flanke de tiu granda amaso anonima de la esperantismo, kiu fervore honeste k sindoneme vivas k laboradas, senĉese uzante nian lingvon kun fidela rememoro por ties aŭtoro k gardante samtempe, en funda angulo de sia brusto, la spiritan trezoron de pia respekto por la tiom larĝe diskutita interna ideo.

Tiu liberala k progresema samideanaro estas ja vere la aŭtentika plimultego de nia movado!

El tiu vivanta internacia popolo ni ricevas ĉiutage, krom donacoj, poŝtkartojn k leterojn, kiujn ni, milicanoj militpretaj, legas tre atente, kun religia silento k eĉ kun malsekeco en okulo pro larmo sincera. Okazas ofte, ke super modesta k simpla letero, la kapoj kuniĝas por avide legi k relegi, flarante la mildan parfumon de ekstera emocio, la kuraĝigajn frazojn k solidarajn esprimojn de tiuj nekonataj, k tamen tre amataj, amikoj, dissemitaj tra la vasta rondaĵo de nia planedo, laŭtigante la samajn vortojn k la samajn esprimojn per sama lingvo, per sama voĉo...

La konvinko ke nia peno, ne nur utilas por afero nobla k decida, sed havas resonon laŭ ĝusta senco, estas tikla instigo por dediĉi, al nia gazeto, la malmultajn minutojn, kiujn ni trovas nun liberaj, inter tasko k tasko konkreta de nia partio aŭ de nia sindikato, rabante ankaŭ, sen indulgo, horojn k horojn al nia dormo, al nia ripozo aŭ al nia distro malcerta, atendante sopire, kiel pagon k dankon, nur la mildan flugadon al nia redakcio de tiuj kovertoj, kun strangaj stampoj aŭ markoj, pruvantaj, ke ni, la hispanoj, ne estas ja solaj en nia doloro, en nia klopodo eviti suferojn al ĉiuj ceteraj personoj.

Estas jam eble pensi pri starigo de la popola fronto esperantista!

Nia bulteno semos k semos konstante, en juna fervora kuraĝo, la ideon pri tuja k fakta unueco tutmonda de ĉiuj honestaj esperantistoj, amantoj de l' vero, amikoj de l' popolo en ĝia kalvario por atingi la supron de monto evitante la fatalan danĝeron de la nigra abismo de l' faŝismo.

Ni martelados daŭre, detruante mensogojn per nia dolĉa instrumento parola, kun la agrabla certo ke almenaŭ, en samideanaj rondoj, neniu metos siajn orelojn k buŝon je la servo de la tiranio, stulte cirkuligante kalumniojn, sed aroge ĉien disvastigante la veron, kiu estas nur unu sola k nuda, pri abomenaj krimoj, tute ne, ĉiam ne okazintaj, diru tion krie!, en la parto kie la popolo regas, k ankoraŭ terure, spasme, flagrantaj en la malfeliĉa parto, kie flirtas provizore la faŝista standardo.

**VIA HELPO DETRUOS MENSOGADON!**

KOMENTARIOJ

# Al angla laboristaro

La sindikatara estraro aranĝis en Britio monkolekton por la hispana laboristaro, k la redakcio de la organo de l' brita poŝta sindikato publikigas diversajn leterojn, kiujn ĝi ricevis rilate al tiu afero.

Kelkaj leteroj entenas akrajn protestojn, ĉefe pro religiaj motivoj. Jen fragmentoj el tiaj leteroj:

«Se la helpotaj laboristoj estas la popolo armita de la registaro, k kiu ricevis permeson en plena libero detrui religiejojn, murdi pastrojn k suferigi al monaĥinoj la plej brutecan, degradan k malhumanan traktadon, kiun oni povas suferigi al sendefendaj virinoj, tiam mi, kiel katoliko, deziras registri mian malaprobon al la agado de l' Unio, eĉ malgraŭ ke tia kolekto estas tute libervola.»

«Miaopinie estas insulto al la miloj da kristanaj membroj de la Unio ke ilia propra organizo helpas tiamaniere potencon tiel barbare k malkaŝe antikristanan kiel tiu de la nuna Hispanio.»

«... ĉu la sindikato konsideras sian taskon subteni la hordojn organizitajn de Moskvo kontraŭ Kristo?»

Ankoraŭ ekzistas pli, sed tiuj estas la plej gravaj, k kiuj incitis nin respondi per mallongaj frazoj. Vere la faktoj estas ja pli gravaj ol la vortoj.

Ni ne bone komprenas la ekziston de laboristoj kiuj estas tiom naivaj, tiom blindaj aŭ tiom trompitaj de la grandega blufo kreita ĉe la burĝa medio.

Estas tri gravaj k fundamentaj mensogoj en tiuj leteroj. La hispana popolo ne ricevis permeson detrui en plena libero religiejojn k murdi pastrojn k monaĥinojn. Nia kontraŭfaŝista batalo ne estas antikristana. Fine, la hispana popolo ne estas hordo organizita de Moskvo kontraŭ Kristo.

Sed ne sufiĉas tion aserti; ankaŭ estas necese tion pruvi. De antaŭ kelkaj jarcentoj estis la katolika eklezio, kiu ĉiam ekspluatis k trompis la popolon en Hispanio. La jezuitoj fakte regis ĉiujn religiajn organizojn k kolektis sub siaj manoj la riĉaĵojn de la lando.

Nur pro tio, kiam la popolo sin sentis atakata de la reakciaj fortoj, tuj sin defendis kontraŭ la ĉefaj estroj de eklezio, kiu agas tiamaniere. Ĝi pravas kiel pruvas la fakto ke la ĉefaj ekleziuloj ĵus antaŭ la ribelo forkuris post ilia kunhelpo en la organizado. Ĉe la episkopaj palacoj oni trovis fabelajn trezorojn, kiujn ili pligrandigis senĉese dum la nombro da senlaboruloj kreskadis k la malriĉaj vilaĝanaj pastroj malsatis.

La popolo nur bruligis kelkajn religiejojn, precipe tiujn el kie la religiuloj mortpafis la popolon k tion ĝi faris sen permeso nek libero. La registaro k aliaj aŭtoritatuloj, de la unua momento celis k atingis la konservadon de religiaj konstruaĵoj; nur kelkaj restis detruitaj. Multaj el tiuj estas detruitaj de la faŝistoj mem, kiuj tion faris por kreskigi la kulpigojn al la popolo. Ankaŭ funkcias diversaj oficialaj organizoj kiuj bone zorgas pri la religiaj artaĵoj.

Tamen ĉe la batalfronto ne eblas atingi tiajn rezultojn, ĉar la faŝistoj instalas kanonojn k diversajn maŝinpafilojn en preĝejoj k uzas ilin kiel fortikaĵojn post la ŝtelo de ĉiaj religiaj artaĵoj.

Ankaŭ estas tute malvera la aserto pri murdado de pastroj k monaĥinoj. Oni nur ekzekutis, post koncerna juĝado, la kulpulojn. Granda kvanto da ili ĝuas plenan liberon k multaj eĉ edziĝis. Reala fakto estas ke niaj karceroj estas plenaj da arestitoj, dum la faŝistoj havas neniun; facile estas imagi kion ili faris.

Ĉagrene ni pensas pri laboristoj kiuj havas tiun specialan koncepton pri kristanismo. Insiste ni petas ilin relegi la Biblion k poste pripensadi. Se ili ne estas hipokrituloj facile konkludos, ke kristanismo estis ĉefe demokrata ribelo kontraŭ la tiamaj ekspluatantoj, ke kristanismo triumfis nur ĉar ĝi estis morala k popola lukto kontraŭ la tiraneco de tiamaj fortoj, militistoj, eklezio k kapitalismo, kiuj ekspluatis tiam, kiel nun la popolon.


Jesuo Kristo predikis moralajn konceptojn, kiuj estas la samaj fundamentoj de demokratio. Sincere oni ne povas nomi «antikristana» nian batalon por defendo de demokrata respubliko, ĉar eĉ se ni ne estus kristanoj, en la nuna batalo kontraŭ faŝismo ni defendas unue la principojn de la doktrino de Kristo.

Fine estas laboristo kiu difinas nin kiel «hordojn organizitaj de Moskvo». Vere tiu laboristo nenion scias pri nia popolo k lando.

Kiam komencis la ribelo ne estis ĉi tie tre grava komunista organizo nek soveta ambasadoro; ni ne scias kio okazos post la milito, sed nia Popola Fronto konsistas el diverstendencaj respublikanoj k socialistoj el kiuj la plej grandega parto interrilatas kun Sovetio tute same ol kun ceteraj landoj.

Ĉiujn niajn asertojn pruvas ankoraŭ du gravaj faktoj. La konstitucia registaro konsistas el diversaj politiktendencaj ministroj; ministro Irujo estas katolika, k la plimulto da ili ne estas komunistoj. Ĉe niaj vicoj batalas multaj katolikaj pastroj, eĉ episkopoj; eble pro tio la katolika Sankta Patro nenion diris pri oficiala sinteno de la eklezio rilate al nia milito.

En kelkaj provincoj lojalaj, preĝejoj funkcias, religiaj artaĵoj estas bone prizorgataj ĉie, ekzistas katolikaj aŭtoritatoj libere laborantaj, la Papo nenion volas difini oficiale; sed malgraŭ ĉio ekzistas laboristoj kiuj kulpigas nin pri barbareco k antikristanismo, ne konsiderante ke ni batalas esence por ĉiuj laboristoj de la mondo, plenumante tiamaniere la plej belajn principojn de universala moralo predikitaj de Jesuo.



## La sorto de la hispana popolo estas la sorto de la tuta Homaro

# EL LA FRONTO

«LOJALA». Jen la nomo de ĉi tiu bataliono de junaj batalantoj. Ĵuslerninte ia plej elementalajn regulojn militistajn ni eliris el Valencio k post kelkhora restado en Madrido ni jam troviĝas en la fronto, en la Guadarrama fronto!

Ni marŝas korpremitaj pro la emocio de ĝojo antaŭlonge dezirata. Antaŭ niaj avidaj okuloj prezentiĝas areto da domoj. Kelkaj el ili surhavas la postsignon de la faŝista artilerio. Ĉiu memorigas nin, ke ĉi tiu bela anguleto, antaŭa restadejo de nenionfarantaj sinjoroj, estas hodiaŭ scenejo de multaj k heroaj okazaĵoj fare de la batalantoj por la Libero k Demokratio.

«Vice, unuope, dekstren». «Laŭlonge de la ŝoseo», komandas kamarado kapitano.

La pafadoj disŝiras la silenton de la nokto plilongigitaj per la eĥo, k perdiĝas en la pinarbojn. Malgraŭ la nesperteco neniu el ni timas k ĉiuj kuraĝe antaŭeniras sen fari la plej etan bruon.

«La gardoŝanĝo»!, krias kelkaj kamaradoj, kiujn ankoraŭ ni ne ekvidas k subite nin surprizas nekalkuleblaj manpremoj.

Ĉiuj demandas, ĉiuj alparolas, ĉiuj scivolas ion. Ni devas klarigi: ~~Ni estas~~ Valencianoj. Ni apartenas al la Unuiĝintaj Socialistaj Junularoj k inter ni venas multaj esperantistoj...

Ĉi tiuj klarigoj niaj estas responditaj per rapidaj k esprimaj komentarioj, kiel jenaj: Ho, Valencio, historie liberala urbo! Valencio, la manĝaĵprovizejo de la milito! Ho, esperantistoj! Esperanto, la lingvo de l' tutmonda proletaro!...

Iom post iom ni alkutimiĝas al la malheleco de la rifuĝejoj tie k tie ĉi aperas vizaĝoj kun kelksemajna barbo. Spite la fortika aspekto, oni divenas per la malforta lumo de la cigaredo la ĝojon k entuziasmon sur ĉi tiuj vizaĝoj de junaj milicanoj.

Subite ni rimarkas, ke la kugloj daŭre siblas; sed, influataj eble de la hardite co de niaj veteranaj kamaradoj, ni ne atentas jam pri ili.

Kun la tagiĝo fresiĝas la vento de la altaj suproj de la montaro.

La veteranoj montras al ni la lokojn plej danĝerajn, kien la pafaĵoj de la malamiko plej multe celas.

Respondeca leŭtenanto de nia pozicio klarigas al ni: «La plej efika armilo por la milito estas la sereneco k la disciplino». Kaj ĉiuj ni aŭskultas plej atente tiujn k pli multajn instrukciojn. Ĉiuj ni havas la ambicion aldoni al nia entuziasmo batalema la plej multajn konojn pri milita tekniko.

Niaj kamaradoj foriras al Madrido por kelktaga ripozado. «Kamaradoj —ekkrias la leŭtenanto—la unua roto de la «LOJALA» bataliano, kies nomon vi portas, batalis ĉi tie plej heroece. Tiu ĉi estas unu el la pordoj tra kiuj la faŝistoj volas eniri Madridon. Vi postenas, do, sur loko treege respondeca.Espereble vi scios plenumi la devon de revoluciaj junuloj.»

«Kamaradoj, «La faŝismo ne pasos!» «Ne pasos!» ni kriegas, dum ni enspiras, kontentaj, la freŝan aeron de la montaro.

Guadarrama, Novembro 1936.

## ◆ AFIŜO ◆ ◆ ◆

La registaro Largo Caballero gajnos la militon, ĈAR:

La modernaj militoj ne estas nur farataj de l' armeoj, sed de la tuta loĝantaro, malantaŭ la batalfronto.

Niaj militaj, ekonomiaj k idealaj avantaĝoj, estas:

La regionoj sub la provizora regado de la ribelintoj enhavas dek milionojn da enloĝantoj k la regionoj sub la legitima registaro enhavas dekvin milionojn da ili. Hispanio entenas 25 urbojn de pli ol 50.000 enloĝantoj, k 14 el ili estas sub regado de nia registaro. La ĉefaj urboj estas: Madrido, Barcelono, Valencio, Bilbao. La industriaj provincoj estas regataj de la registaro Largo Caballero.

La ĉefaj militaj industrioj ankaŭ estas regataj de la registaro. La grandaj elektraj konstruaĵoj ĉe la sudo de Pirineaj montoj. La 75 pro cento el la hispanaj karbominejoj. Ĉiuj zink—k fer—minejoj (Bilbao k Santander). Ĉiuj hispanaj plumbominejoj (Cartagena k Linares). La minejoj de hidrargo (Almaden). La grandaj fabrikoj de nutraĵoj (Valencio, Madrido, Barcelono). Ĉio en niaj manoj:

La Banko de Hispanio posedas unu el la plej grandaj trezoroj en Eŭropo, k ĝi estas en niaj manoj. Tio signifas, que se la fremda «neinterveno» estus reala, ni atingus dum mallonga tempo la nuligon de la faŝismo. Ĉar ne estis tiel, pli grandaj penoj estas necesaj SED NI VENKOS. Ĉar, definitive, la registaro Largo Caballero sin apogas sur la urbaj laboristoj k sur milionoj da malriĉaj kamparanoj, kiuj bone scias el kiu flanko ili povos ricevi la teron k la necesan helpon. Se ni aldonas al tio la avantaĝojn, kiuj supozas, la altgrada moralo, organizado k disciplino, LA REGISTARO LARGO CABALLERO ESTAS LA REGISTARO DE LA VENKO!!

# SEKRETAJ PLANOJ DE GERMANA FAŜISMO

Kun siaj blekoj kontraŭ «ruĝa militismo», la germana faŝismo intencas kovri siajn manovrojn pri Okcidento.

La nuna kontraŭsoveta kampanjo komencis du monatojn ĝuste antaŭ la ribelo de generalo Franco. Ĝin iniciatis Goebels dum la periodo, kiam la reprezentantoj de l' hispanaj generaloj akiris en Berlino la unuajn sekretajn sendojn de armiloj al faŝistaj militistoj de Maroko.

Kiam generalo Franco komencis sian agadon, tiu kampanjo kreskis senĉese k alvenis en netolereblan situación kiam la hispanaj okazintaĵoj graviĝis k la germanaj aviadistoj, vestitaj per uniformo de Fremda Legio, komencis bombardi la hispanajn urbojn.

La germana interveno en hispana milito ne nur estas kaŭzita de iu rekta ekonomia intereso, sed estas grava morala intereso. Se la ribelo sukcesus, tuj aperos simila aventuro en Francio, fare de la francaj faŝistoj kontraŭ la tiea Popola Fronto.

Tiuj, kiuj regas la germanan politikon, perfekte kalkulas kiom da perspektivoj malfermiĝus tiuokaze, por la faŝista Germanio. Se nun, en malproksima Hispanio, la germanaj faŝistoj trovas diversajn rimedojn k pretekstojn por sendi helpon kontraŭ la hispana popolo, kiom da ili ne ekzistus por Germanio okaze de franca civila milito.

Vere ekzistas interkonsento inter Francio k Anglio pri reciproka helpo okaze de germana atako. Sed, kiu povas certigi, ke Anglio plenumus tiun helpon se Germanio atakus Francion sub formo de kaŝa interveno en interna milito?

Plie, ĉu la fakto de franca civila milito ne transdonus al Germanio aŭtomate la hegemonion sur okcidenta Eŭropo?

Tiu celo estas tiel dezirata, ĝia prezo estas tiel malgranda, ke estus naive kredi ke la germanaj faŝistoj rezignos interveni en la hispanaj aferoj. Ĝia interveno daŭros, pli malpli kaŝe, ĉar la hispana milito estas por Germanio nur la antaŭparolo de civila milito en Francio.

**Venu via solidareco!**

# Bona Amiko!

Neniel vi devas forgesi, ke nia gazeto POPOLA FRONTO, motoro de viva esperantismo, aperas nur je niaj propraj rimedoj, sen plia subteno krom la bona volo de ĉiuj niaj internaciaj amikoj sufiĉe lertaj, sur ĝusta nivelo, por kompreni la signifon k sekvojn de nia brava movado, sufiĉe laboremaj por traduke represi k dise legadi nian materialon k sufiĉe malavaraj por ĝentile havigi al ni la simbolan k utilan municion de siaj donacoj.

La sinteno de multaj registaroj, kontraŭ la hispana popolo, ne permesas sendi poŝtmandatojn al nia lando. En tiu okazo niaj amikoj devas sendi la monon nur per bankbileto aŭ ĉeko en valorigita koverto. Ankaŭ respondkupono!

Sed ĉiel ajn sendu la monon al nia financa adreso:

ANTONIO PONT
Plaza Republica n.° 2 Valencia (Hispanio)

# Balbuto de nova ekonomio

La perfida militista ribelo faris ankaŭ bruan renverson en la ekonomio de la lando. Tial la superaj instancoj popalaj devas zorge riparadi la breĉojn, kiujn faris, al la komerco k industrio, la perfido de tiuj friponoj pretendantaj trudi teroron k sklavecon. La popola respondo, antaŭ la provoko estis tiel intensa, ke la natura sekvo estis certa transformiĝo socia k ekonomia kies fundamentajn ŝtonojn oni nun masonas precipe en Katalunio.

La akumulado de riĉaĵoj, en manoj de nur unu grupo da personoj, ĉiufoje pli reduktita, sekvigis plian akumuladon de mizero en la proleta klaso k, pro la kruda fakto, ke tiu grupo, por savi siajn privilegiojn, ne hezitis ekbruligi sangan militon, la venko de l' popolo devas signifi gravan ŝanĝon interne k ekstere de la ekonomia fizionomio.

Estas necese do nun jam organizi la produktadon, gvidadi ĝin en la senco, ke la sola profitanto estu la kolektivo, al kiu devas ja aparteni la gvidado de la nova ordo socia. La anstataŭigon de la privata sistemo per la kolektiva oni efectivigas, ankoraŭ iom skize k balbute, kolektivumante la rimedojn de la grandaj entreprenoj k permesante la ekziston k disvolviĝon al la privataj propraĵoj de la malgranda aŭ modesta industrio.

La streĉa klopodo revolucia de la popola klaso, fatale devigata preni armilojn por detrui la faŝismon, starigas la demandon pri tuja ŝanĝo en la ekonomia k socia strukturo ekzistinta ĝis hodiaŭ.

Unu el la ĉefaj problemoj, kiujn prezentas la nova aranĝo, estas tiu pri la organizado de la laboro, por trafa distribuo de la produktoj konkorde kun la sociaj bezonoj.

Post la 19. de Julio, la granda burĝaro, cinike faŝista, forlasis siajn postenojn. Vasta plimulto forkuris eksterlanden; alia parto malaperis. La koncernaj entreprenoj ne povis resti sen mastrumo. Sekve de tio la laboristoj mem decidis interveni en siaj fabrikoj kreante laboristajn komitatojn de kontrolo. En Katalunio stariĝis oficiale la Ekonomia Konsilantaro, kiu orientas formale la paŝojn, iom empiriajn, de la industriaj laboristoj, k mastrumas la amplekson de la ekonomia vivo laŭ postuloj de la cirkonstancoj k plenumo de la volo aŭ deziro alsopirata de la ĝenerala klaso. Sed la kolektivumado de la grandaj entreprenoj signifus malmulton sen efika helpo por plia disvolviĝo. Tial oni komisiis al Ekonomia Konsilantaro studi la funkciadon de ia Kaso por Industria k Komerca Kredito kun la celo havigi financan subtenon al tiaj entreprenoj k samtempe algrupigi la industrion laŭ konvenaj ŝtupoj, kiuj estu efiko por kontentiga profito, k eblo por bona ekstera komerco, tiom grava en la eksportado de variaj k bongustaj fruktoj.

Nun oni ankaŭ studas la manieron por la starigo de oficiala organo pri esploro k konsulto teknikaj por havigi al la industrio plian efikon k plian progreson.

# FAŜISTA ABOMENO

Laŭ fidindaj statistikoj, ĝis nun estis murditaj en la provinco de Sevilla pli ol kvar mil laboristoj k maldekstruloj; en la provinco de Cordoba ĉirkaŭ du mil; en provinco de Granada tri mil kvincent proksimume; en la taŭroplaco de Badajoz, ĉe la areno, estis murditaj antaŭ multnombra ĉeestantaro, mil okcent arestitoj; en urbo Coruña oni faris publikajn ekzekutojn grandkvante; en urboj San Sebastian k Irun la loĝantaro duoniĝis; en la faŝista k katolika urbo Pamplona estis murditaj 24 monaĥoj kiuj ne volis batali kontraŭ laboristoj, en la taŭroplaco de Salamanca, k ankaŭ ĉe la areno, estis cinike turmentata k poste mortigita la socialista deputito Andreo Manso.

Tiuj sciigoj estas rigore veraj, sed malgraŭ tio, la propaganda blufo pere de radio, gazetaro, k. t. p. estas de la unua momento tiel grava, ke la fremdaj popoloj k diplomatoj ne estis nek estas bone informitaj.

Se la hispana popolo povus dissendi ĉien kompletajn sciigojn pri la ĉi tieaj veraj okazintaĵoj, se ĝi havus la ilojn por tion fari, ĉiuj decaj homoj leviĝus samtempe k energie protestus kontraŭ la nuna faŝista barbareco en Hispanio, kiu nenie havas alian precedencon.

## HISPANIO SANGAS TERURE



Nia suda lando suferas angore la premon de l' monstro k tamen sen ia hezito ĝi luktas ankoraŭ heroe defendante, ne nur sian liberon sed ankaŭ la dignon k pacon de la tuta mondo. La internacia solidaro estas kvazaŭ tuko viŝanta la ŝviton k sangon pro nia sindono. Kion vi faris ĝis nun, tre kara k bona amiko internacia, por nia batalo?

**Esperanto vibras nun kiel karno honesta de klaso modesta**

# PRUDENTO k RAJTO

Post intervjuo kun nia ŝtata Prezidanto Emanuelo Azaña, angla ĵurnalisto raportas en gazeto «Times», jene:

«La Prezidanto asertis ke la aktualaj okazintaĵoj ne povas sekvigi la nuligon de la nuna registaro, kiu esprimas la decidon de la hispana popolo montrita per lasta baloto, nek de la religia libero.

Ankaŭ diris, ke li ĉiam defendos la demokratajn instituciojn, ke la atako kontraŭ la respublika registaro estis preparita en kunlaboro kun fremdaj landoj, kies nomojn li preferas ne prononci.

Evidentiĝas—li aldonis—ke ĉi tiu ne estas nacia konflikto sed internacia. Ni asertas ke ekzistis interrilatoj inter la ribeluloj k kelkaj fremdaj registaroj. Ankaŭ estas senduba fakto ke la rezulto de nia milito havos internaciajn konsekvencojn.

La politiko de ne interveno starigita de kelkaj landoj, nuligas la rajtojn de la legitima hispana registaro k tio fakte estas kvazaŭ aprobo al la organizoj, kiuj deklaris militon al registaro.

Tio vere signifas aplikon de sankcioj kontraŭ la konstitucia registaro. Se ne estus aperinta tia politiko, la milito jam estus fininta antaŭ multe da tempo.

La militistoj sendube pensis, ke la daŭro de l'milito estus nur je du aŭ tri tagoj; sed ili eraris, kiel pruvis faktoj

Sub la Respubliko ne ekzistis en nia lando persekutado nek netoleremo. Kontraŭe, la Respubliko estis tolerema, ĝi ne maldungis iun oficiston pro politikaj kaŭzoj. Nur ĝi petis al ili lojalon; la armeo estis eĉ dorlotita, ĝia budĝeto estis pligrandigita.

Pri religio, la Respubliko nur apartigis la eklezion de la Ŝtato. Ĝi ne fermis preĝejojn nek persekutis nek malpermesis la taskon de l' pastroj. Kaj se la registaro venkos, mi estas preta subteni la religian liberon; ĉiu povos ĝui sian liberon k estos persekutoj al neniu. Nur ni petos al la eklezio ke ĝi restu en sia spirita kampo.

La leĝo rilatanta la malpermeson de la religiaj lernejoj, estas la sama, kiun Francio adoptis antaŭ multaj jaroj. La hispana Konstitucio postulas laikan ŝtaton k laikan instruadon; la registaro nur plenumis tiun postulon, sed ĝi ne malpermesis la religian instruadon, kiun la eklezio povis fari libere. Sed la infanoj ne devis resti, kiel ĉiam, en manoj de la religiaj ordenoj, ĉar tio supozas liberon por fabrikado de malamikoj de la respublika reĝimo.

Sed krom tio, la fundamenta aspekto de l' afero ne estis religia sed ekonomia; temis pri la distribuo k kultursistemo de la tero, pri la plibonigo de vivkondiĉoj al kamparanoj k laboristoj.

Dum la estonto, la registaro kontinuos sian socian programon laŭ la leĝa vojo. La popolaj deziroj povos sin esprimi per la universala baloto k parlamento. La registaro ĉiam reprezentos la hispanan popolon k sendube ĝi akceptos por sia programo certajn modifojn por plibonigi la vivnivelon de nia popolo.

Fine la Prezidanto prononcis jenajn vortojn dediĉatajn al angla popolo:

«Mi tute fidas al spirito de libero k justo de la angloj k mi ne dubas, ke ĝi konsideros, kiel necesa, la firman solidaron inter la eŭropaj demokratioj k ambaŭflanka intereso al politiko de paco.»

# LETERA VANGOFRAPO

La hispana eksministro Marceleno Domingo aperigis sur la franca gazeto «L' Oeuvre» respondon al kelkaj faŝistemaj vortoj de generalo De Castelnao. Tiu franca generalo estas bone konata kiel mallerta militisto k kiel freneza reakciulo; li estas unu el la ŝovinistaj agitistoj malamantoj de la popolo.

Jen la respondo de M. Domingo:

«Mi legis vian artikolon ĉe «L' Echo de Paris». Mi ne komentos vian spiritan elegantecon nek la delikatecon de viaj vortoj.

Mi ne deziras kontraŭmeti certajn adjektivojn al la viaj; nur interesas al mi difini la jenon:

1e La hispanoj, kiujn vi defendas estas la generaloj kiuj solene ĵuris servi kun lojalo la respublikan reĝimon, k perfidis tian ĵuron ribeliĝinte. Se vi kiel generalo konsideras tion deca, mi bedaŭras.

2e La hispanoj, kiujn vi defendas ne estas tiaj plejparte. Ili estas maŭroj transportitaj el Afriko por invadi Hispanion k subpremi ĝin. Se kiel generalo de lando, kiu havas gravajn rajtojn k devojn en Maroko, vi kredas ke oni devas defendi tian proceden, vi tion diru klare, sincere k konkrete. Ni bezonas scii ĉu ekzistas franca generalo, kiu konsideras aprobinda la rajton de la marokanoj alveni en Eŭropon k batali kontraŭ la enloĝantojn de lando kiu subskribis kun Francio la traktaton de Algeciras.

3e La hispanoj, kiujn vi defendas, ĉiuj estis germanemaj dum epoko ne ankoraŭ forgesita; tiu de 1914 al 1918.

Ankoraŭ nun ili estas germanemaj kiel montras la saluto, sendita de generalo Cabanellas al Hitler. Sendube estus interesa, ke generalo De Castelnao remontros sian simpation al generaloj, kiuj post sia venko liverus al Germanio k Italio, Nordafrikon k la Balearajn Insulojn ĉi tio, certe, ne facilugus la interrilatojn de Francio kun siaj afrikaj kolonioj.

4e La hispanoj, kiujn generalo De Castelnao nomas kiel la «Front crapulaire» estis entuziasmoplenaj francemuloj dum la epoko kiam tiuj, kiujn li defendas, estis germanemaj.

Dum la eŭropa milito, la tiama hispana reĝo Alfonso de Borbon, kiel nun generalo De Castelnao, nomis nin «la kanajlaro».

«La kanajlaro» de 1914 k tiu de 1936 estas la sama forto kiu ĉiam helpis Francion, k kiun Francio povus utiligi denove okaze de ebla dangero kies tujan eblecon neniu povas ignori.

Francio havus novan germanan landlimon se venkus tiuj, kiujn vi defendas; generalo De Castelnao. Se la Popola Fronto venkus neniam estus Hispanio landlimo, ĉiam estus la hispana mano, kun la sama bonvolo, preta helpi sian najbaron.

Nenion plu, generalo. Mi ne envias viajn adjektivojn, viajn spiritajn inklinojn nek viajn fremdajn interrilatojn. Nur mi invitas vin al pripenso. Neniam mi kredis, ke civitulo estus devigata sendi tiajn indikojn al militisto, nek hispano resti dolorige devigata respondi tiel al franco.

MARCELENO DOMINGO
Eksministro de Publika Instruado de Hispanio

**AŬSKULTU RADIODISSENDOJN DE VALENCIO PRI HISPANA SITUACIO EN ESPERANTO!**

Stacio de Komunista Partio—ondlongo 41,87 metroj—marde k vendrede je la 17ª horo (hispana tempo)

Stacio de Socialista Partio—ondlongo 41 metroj—lunde k sabate je la 12ª horo (hispana tempo)

# LA PIA EPISKOPO

## VERA EPIZODO

Kun la plej dolĉa k milda voĉo li alvenis iun vesperon ĉe la komandanto de la militzono. Li ne iris por peti indulgon; li deziris favori neniun. Li eĉ ne deziris peti ke la komandanto ĉeestu la preĝejon, nek li celis al bagatela konversacio...

Tuj kiam li alvenis, la episkopo de Tuy diris:

—Sinjoro komandanto: Mi deziras peti favoron. La fusilmortigoj...

—Ne, via episkopa Moŝto—respondis la armeestro, kiu kredis ke la religiulo intencas peti indulgon—. Ne, ne povas esti kompato al tiuj uloj, malamikoj de la ordo k de la trankvilo.

—Komandanto... Mi ne venas por tio. Nur mi deziras peti favoron. Anstataŭ okazigi la fusilmortigojn apud la vojoj aŭ en la karceroj, ili devas okazi ĉe la aleo ĉiuvespere je la kvara. Tiel estos instruiga spektaklo... Ke ĝi estu longedaŭra, por pli bone servi k kontentigi dion...

La aleo estas moda promenejo en urbo Tuy. Je la kvara posttagmeze ĉeestas tie granda popolamaso kiu plaĉe promenas.

Tiu «bonulo», la episkopo, deziris okazigi tiam la spektaklon de l' fusilmortigoj por ĉies ĝistro...

# PERFIDA NEŬTRALECO

Antaŭ kelkaj tagoj (la 1-an Novembro) estis kaptita apud Parla, en la batalfronto de Madrido, la itala soldato Luigi Corsi Filaberta.

Li naskiĝis en Villa Costelli, provinco Brindisi (Italio); ne temas pri volontulo ĉar li deklaris ke oni devigis lin.

Luigi Corsi apartenas al la deka grupo de l' artilerio de Romo. Li eniris en sian regimenton la 19-an Aprilo, k laŭ la leĝo li devas militservi dum 18 monatoj; konsekvence li apartenos al la itala armeo ĝis la 10-an Oktobro 1937.

Laŭ sia deklaro, li k liaj kunuloj estis devigataj vojaĝi en Hispanion, de la estro Luigi kiu komandas tiun artilerian grupon k kiu post kuraĝiga alvoko, elektis 50 soldatojn, k devigis ilin al vojaĝo.

Antaŭ sia eliro ĉiu el ili ricevis 200 lirojn k tuj post la alveno en Caceres, leŭtenanto Revelle donis al ĉiu 200 pesetojn.

Tiuj 50 artileriaj soldatoj enŝipiĝis en Genevo kune kun 3 leŭtenantoj, Revello k du aliaj.

Ili vojaĝis per itala ŝipo, regita de militaj italaj maristoj k elŝipiĝis en hispana haveno Vigo. La ŝipo transportis 15 kanonojn k 50 kestojn de municio.

Tra Salamanca, Caceres, Talavera k Torrijos ili translokiĝis al Toledo, laŭ oni legis sur la notlibro, kiun la kaptito kunportis.

Li vidis en Caceres 15 tankojn, ĉiuj italaj k kondukataj de italaj soldatoj. Li certigas ke en la zono de Illescas estis 6 kanonoj, kies servon li plenumis kiel helpanto.

Tiuj kanonoj estis komandataj de italaj oficiroj, k la tuta soldataro kiu funkciigis ilin estis ankaŭ italoj.

Tuj kiam alvenis en Hispanion, Luigi Corsi estis nomata subleŭtenanto.

— —

La 6-an Novembro je la 9.ª matene la respublikaj aeroplanoj faligis faŝistan ĉasaeroplanon «Fiat». La aviadisto sin ĵetis k estis kaptata de la milicanoj.

Li estas nomata Alfredo Piccoli, naskiĝis en Bolonia (Italio) k estas 28 jaraĝa. Li estis dungita en Italio kun salajro de 2.500 pesetoj po monato.

Antaŭ unu monato li alvenis en Sevilla, poste li translokiĝis al la aerodromo de Talavera, kie li laboris sub la gvidado de la itala leŭtenanto Palanca. La aliaj aviadistoj tieaj ankaŭ estas italaj.

Li ricevis titolon de kapitano de hispana aviadarmeo.

Li estas nun ĉe hospitalo ĉar estas vundita. Lia aeroplano estis armita per moderna mitralilo provizita de kugloj «dum-dum».

## NIA DANKO

Emocie ni laŭtigas tutmonde pri la tuja preteco de multaj amikoj havigi monon al ni per plej diversaj manieroj. Ni daŭrigas nian laboron pli firmaj ĉiufoje!

En venonta numero ni kvitancos, per kompleta listo, la donacojn ricevitajn, modestaj k reliefaj, sed ĉiuj egale dankindaj kun tremoj de koro.

# Lasthora Impreso

La faŝista serpento sukcesis trafi la pordojn de Madrido. Tie la popola armeo kun alta moralo k taŭga armilaro faras digon k respondas per entuziasma atako por rompi la dentojn ŝtalajn de la malamiko. Pruvon pri la universala karaktero de nia lukto montras la rimarkinda fakto ke la plej firma apogo, por la defendo de ĉies ĉefurbo, estas kolono internacia kiu konsistas el kelkaj miloj da eksterlandaj k-doj, inter kiuj troviĝas kelkaj esperantistoj.

La nunaj, tre interesoplenaj, tagoj estas decidaj por plirapidigi la venkon. Por pli senembarase gvidadi la militon la nova hispana registaro jus translokiĝis al Valencio.

# RIMARKO

La tradukado k represado de la materialo el POPOLA FRONTO ne nur estas permesata sed rekomendata.

Tamen ne forgesu mencii la devenon k sendi ekzempleron al nia redakcia ĝenerala adreso.

POPOLA FRONTO
Mar, n° 25.-Valencia

## POPOLFRONTA LETERUJO

K-do: L. van Eijsden, Nederl. —Via korespondanto L. Soler fartas bone en Cocentaina baldaŭ li skribos vin.

K-do: D. v. d. Kruijf, Nederl. —Ni akceptos tre volonte vian monsubtenon. Ĝuste tion bezonas nia bulteno. Koran antaŭdankon!

K-dino: L. Castel, Francio.— Se vi ne povas sendi monon per poŝtmandato, bv. sendi ĝin per bankbiletoj aŭ per ĉeko.

Al la respondkupon-sendantoj.—Ne forgesu sigeligi la respondkuponojn ĉe via poŝtoficejo, kontraŭe ili ne utilas al ni.

K-do: Herm Klaassens, Nederl.—Via korespondanto Francisco Serrano fartas bone en la fronto de Teruel.

Al multaj.—Leterojn sendu nur al nia Redakcio.

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencio

1.ª JARO N.º 3 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 1 DECEMBRO 1936

# Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO


ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA VALENCIA (Hispanio)
REDAKCIO K ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25

## MADRIDO!

Gracie ĝi kuŝas en la ĝusta mezo de la hejma lando. Intelektula centro, estas Madrido, krom oficiala ŝtata ĉefurbo, citadelo de popola konscio. Nesto por la komenco de la socia laborista movado en Hispanio, la unuaj voĉoj pri socialismo aŭ je defendo de la internaciecaj doktrinoj aŭdiĝis tie. Paŭlo Iglesias, vera apostolo, fondinto de la Hispana Socialista Partio, estis multfoje la sola marksista deputito en la nacia parlamento.

Poste jam, sub monarkio aŭ en respubliko, ŝerce aŭ serioze, la politika kontrolo, de tuta la ĉefurba vivo, apartenis plene, sendispute, al la proleta klaso kun la efika helpo de grandkvanta liberala oficistaro.

En Madrido, dum la februara balotado, la popolo, kun gaja mieno k hela rideto, ŝtope remburis la balotujojn per voĉdoniloj favoraj al Popola Fronto. Tiu sama Madrido, kvin monatojn poste, hardita en sankta kolero, kun ŝaŭmo en la buŝo k brilo en pupilo, sen pliaj armiloj krom piedoj k pugnoj, ne jam ridetante sed dentojn premante en propra defendo atake alsaltis kazernojn, detruis sur la strata pavimo la nigran perfidon de generaloj sen honoro k aroge, tre vigle, balais la sterkon de faŝista signo, sopire ĝuante la heroan rekonkeron de sia urbo post ekstermo, en la ovo mem, de la ĝermoj de abomena socia epidemio.



—Mi estas la progreso, la civilizo, la kulturo!...

En najbaraj lokoj blekis la bestaĉo. La madridanoj ne havis do tempon ankoraŭ por dormo en laŭroj de heroa venko. Tuj post rapida preparo, la malamika bando atakis furioze laŭ helpo de fortikaj masonaĵoj, konstruitaj tiucele de la iama reakcia registaro en la proksima abrupta montaro, kiu en alta ĉenego, de Guadarrama ĝis Somosierra, ja por Madrido estas kvazaŭ protekta brovo. Inter pinoj k abioj fariĝis fama la brava devizo: «Ili ne pasos!» Certe tiel okazis, ĉar la dentoj de la monstro rompiĝis antaŭ ol povi mordi konkere, en tiu parto, eĉ unu futon da tereno.

Antaŭ la brua fiasko de siaj planoj, la hokokruca stabo studis novan taktikon: ataki sude la ĉefurbon, sekvante la bordojn de rivero Tajo, glate fluanta tra granda ebenejo, etendita de la limo de Portugalio ĝis la perono de Madrido.

Kun abunda provizo de tankoj italaj, kun trupoj de maŭroj, forprenitaj per trompaj allogoj de iliaj sovaĝaj gentoj el Afriko, komencis metoda faŝista ofensivo. La popola armeo, sen taŭga armilaro por ebena batalejo, preskaŭ sen artilerio nek kavalerio, perdis poziciojn, vilaĝon post vilaĝo, tute senpova por eviti la marŝon de fajro detruanta, per kiu, la eternaj malamantoj de la modesta klaso sukcesis fari vojon al Madrido.

Tamen la sojlo estis abismo, en la pordo ĵaluze ekaperis dornoj!

Madrido ankoraŭ estas Madrido! ĉiufoje pli sekura, ĉiutage pli fiera eviti sian falon sub la hufoj de lakeoj de la sennaciecaj potencoj de l' kapitalismo, por meriti, sen makulo, nomon de ĉefurbo de la universala antifaŝismo!

## FACILA DILEMO

En nia epoko, hodiaŭ mem, kiam la popolo en amaso, la Homaro!, defendas sian ekziston, neniu povas, nek devas, nek rajtas, diri splene ke li restas neŭtrala.

Esperanto, fontano de alta idealo, liveras ĝentile, jam de multa tempo, la freŝan pluveton de siaj steloj simbolaj ankaŭ sur laboristaj distriktoj. La ĝenerala movado ricevis pro tio injekton de forta energio. Diligenta nova kolegaro certe ne laciĝas en laboro paca. En saĝa logiko, paco ne estas atendo stulta de frapo, sed oportuna bato al provokema fraponto.

Al perfida atako de bandito, kontraŭ homo pluganta pace sian kampon, oni rajtas ja respondi per ĉia defendilo. Tiokaze certe eĉ la plej ĝiba feraĵo montrus hele delikatan aŭreolon. Ĉu ne gajnos do ankoraŭ prestiĝon nia lingvo bela, kiel nobla instrumento, je la servo aktiva de ofendita tavolo socia?

Spirita kerno de la esperantismo estis honesta, kvankam nebula, sento kun religia nuanco sub nomo de Interna Ideo, aspiro feliĉa pri konkordo k amo inter ĉiuj homoj bone komprenantaj unu la alian. Bedaŭrinde, la homojn ne nur ligas pli aŭ malpli bela kombino de vortoj sed la komuna sorto de sufero k doloro aŭ la sama volupto en plezuro k diboĉo.

En nia lando la popolo, kun sia registaro, sen ia preparo devis akcepti dilemon je vivo aŭ morto. La faŝismo cinike, sen ero da honto, en la internacia scenejo ŝanĝis la terminojn akuzante kanajle la popolon je la frenezaj krimoj, kiujn ĝi mem faradas.

Obeinte severan admonon de nia konscienco, ni, esperantistoj, parto de l' popolo, laŭtigis la voĉon sonoran de nia lingvo.

Nia gazeto estas nek burĝa nek proleta; ĝi estas antifaŝista! Jen karesa titolo de civitaneco pri libero aŭ mallibero. Facila dilemo, por klasbatalaj kamaradoj, inter granda kapitalismo k proletaro; sed ankaŭ facila dilemo, por demokrataj samideanoj, inter stagno k progreso. Facila dilemo por tiu, kiu volas infane rigardi la ĉarmon de blankaj lanugoj en alta lazuro, k ankaŭ facila dilemo por ĉiu alia apud ni batalanta ĝis morto, en plenumo de sankta la devo.

Facila dilemo por la prospero aŭ pereo de nia, tre multe ja nia, Esperanto!

**Internacia solidaro, en fluanta lavango, iru brave tra la mondo!**

KOMENTARIOJ

# Bazo de abomena civilizo

Por ni, hispanoj, kiuj travivis la antaŭajn k unuajn momentojn de ĉi tiu lukto, estas bone konataj la trajtoj de faŝista taktiko, ĉar ni povis sperti ĉiuminute la faktojn, rekte k propraokule.

Sed eksterlandanoj ne povis akiri senpere ĝustajn k precizajn informojn k restis nevole sub la influo de lerte organizitaj propagandiloj; tial, ili konis nur la «veron», kiun oni liveris al ili, laŭ diversaj formoj celantaj la plej perfektan trompigon.

Sendube, la faŝistoj antaŭe k zorge preparis sian propagandan planon, ĉar ili tuj komencis konstantan blufon, laŭ tute jezuita sistemo, kiu konsistas cent procente el hipokritaĵoj.

Komencis la krimoj k samtempe la faŝistoj iniciatis akuzon al ni pri ĉio imagebla k neimagebla. La akuzadon ili uzis kvazaŭ densa vualo per kiu ili kovris siajn abomenajn murdojn.

En kunlaboro kun internacia faŝismo ili mastris radiostaciojn, kinojn k gazetaron k per tiuj elementoj kreis atmosferon en la tuta mondo, tute malfavora al nia popolo, kiu estis prezentata kiel sovaĝa hordo plenumanta ĉiajn monstraĵojn.

Finfine la vero ĉiam elŝprucas tra ĉiaj kaŝiloj. Nun la situacio alvenis en momento kiam la veraj okazaĵoj estas ekkonataj ĉie. La faŝistoj murdis k murdadas senlime, ili mortigis ĉiujn maldekstrulojn k iliajn familianojn, ĉar tiamaniere «jam ne plu restos tia semo»; ili eraras ne atentante ke ĉiu atenco kontraŭ libero nepre naskas milojn da liberemuloj.

Ili intencis senkuraĝigi la pacan loĝantaron en la ariergardo per malnoblaj bombardoj de nemilitaj urboj, kie ili mortigis grandegan kvanton da virinoj, infanoj k maljunuloj, sed kontraŭe al siaj esperoj la loĝantaro ne malkuraĝiĝis, ĝi tremis k vibris intense pro indigno, mobilizis tutajn siajn fortojn k pretiĝis al baldaŭa k fina venko.

Kiuj akuzis nin pri barbareco, intense detruas valorajn artaĵojn kiam ili malsukcesas ne atingante siajn celojn, kiam siaj militaj planoj k sinsekvaj fanfaronaj anoncoj ridige fiaskas antaŭ la popolaj tranĉeoj.

La faŝistoj nur pafis kun kuraĝo k trankvilo dum murdadoj en siaj urboj, bombardante sen lukto pacajn urbojn; antaŭ niaj trupoj ili forkuras, kontraŭ niaj aeroplanoj ili ne volas batali. Bataloj okazas nur kiam ni devigas ilin al lukto; la sukcesoj kiujn ili ŝajne atingis k propagandis trogandigitaj, venis al ili ne pro ilia kuraĝo, sed pro nia manko de taŭgaj bataliloj, sed tia situacio jam malaperis k ilia malespero kreskis tiagrade ke ili jam perdis ĉian prudenton, minacas persiste, pliigas siajn krimojn k tute malatentas ian ajn noblan senton.

Generalo Queipo ĵus diris al fremda gazetisto, ke nia defendo k kontraŭatako en Madrido ne surprizis lin, ke li bedaŭras pri tio ke ni estas ricevintaj batalilojn, per kiuj ni malebligis al ili eniri Madridon, kies loĝantaron ili tuj fusilmortigos almenaŭ ĝin duonigante.

Li aldonas: «Estas barbaraĵo pretendi savon de l' vivo de tricent aŭ kvarcent mil madridanoj. Mola, Franco, Cabanellas k mi opinias, ke kiam ni mortigos ilin, jam la milito estos finita k paco revenos en Hispanion.»

«Ni mortigos ĉiujn virinojn, infanojn k maljunulojn, kiuj baros nian vojon. Ni ĉian projektis interkonsente kun Germanio k Italio, k ni decidis ke necesas mortigi tri aŭ kvar milionojn da hispanoj por ke nia venko estu definitiva. Se ni ne mortigas ilin sur la batalkampo, tion ni faros iel ajn k mi certigas, ke tiu tasko estos plenumata per niaj Fremda Legio k maŭraj trupoj».

«Ni ne povas ne plenumi nian promeson al Germanio k Italio, ĉar ni estas homoj kun honoro.»

Tian senskrupulan promeson ili komencis jam delonge plenumi; ĉiuj viroj k virinoj, kiuj ne povis sendube atesti pri sia faŝisteco estas murditaj, k kelkafoje post nekredeblaj turmentoj. PLI OL 200.000 PERSONOJ estas mortigitaj de la faŝistoj k la furiozo ne ĉesas, ĝi ankoraŭ soifas sangon de estuloj kies sola kulpo konsistas el amo al libero k progreso aŭ el neaparteno al faŝistaj vicoj.

La ribelintoj jam superis siajn aliancanojn, la italaj faŝistoj, kiuj en Abisenio montris al la mondo ĝis kia grado estas monstra la faŝista taktiko; hispanaj faŝistoj ne nur murdadas civilulojn, detruas hospitalojn k bruligas ĉion, sed ankaŭ inventas novajn procedojn por terurigi nin.

Antaŭ kelkaj tagoj, la respublika aviadisto José Antonio Galarza estis devigata forlasi sian aeroplanon dum aera lukto k per paraŝuto li falis en faŝistan zonon. Postan tagon, el itala bombarda aeroplano, venis en Madridon monstra sendaĵo; kun mirego en malfermitaj okuloj la madridanoj vidis ke per la sama paraŝuto la faŝistoj sendis la kripligitan kadavron de la aviadisto, en ligna kesto.

Estas tiel granda tiu monstraĵo, ke ni ne povas dubi pri ĉies indigniĝo. Ĉu estas eble ke povas ekzisti homoj, kiuj kapablas elpensi k realigi tian krimon?

Ni ĉiuj, homaranoj, respondos kiel decas tian konduton. Ni hontas pri la ideo ke tiuj sovaĝaj bestoj povus venki eĉ kun helpo de internacia faŝismo. Ni rezistos, eĉ per lasta guto de nia sango, iliajn atakojn k ni venkos ilin. Ankaŭ ni esperas, ke ĉiuj demokrataj popoloj helpos nin entuziasmoplene, kun heroa grandeco, en nia tasko por finigi tiun ondon de barbareco kiu post la detruo de nia lando intencas inundi la ceteran mondon.

Poste, ankoraŭ okazis nova barbarega fakto kiu difinas senvorte la faŝistan koncepton pri etiko k homa digno. Per bruligaj bomboj elĵetitaj el fremdaj aviadiloj, la faŝistoj detruis en Madrido la Nacian Bibliotekon, kiu entenas du milionojn da libroj k broŝuroj, kelkiuj valoregaj aŭ unikaj ekzempleroj.

Cinika k kruela tributo al faŝista civilizo!

Tion ili ne faris hazarde; zorgeme ili planis tiun agon, ĉar temas pri granda konstruaĵo, facile videbla, kiu estis trafe serĉata k bruligata intence k sisteme, per bomboj ĵetitaj kun tiu ununura celo.

Nia koro ne ŝiriĝas pro doloro, niaj larmoj ne elfluas el niaj okuloj, niaj pensoj ne iras al kompato; ŝtormo de indigno pelegas nin al firma plenumo de nia devo, al hardigo de nia decido. Ni venkos tian novan «civilizon», ni evitos ke ĝi povu sukcesi, ni triumfos por la bono de l' progreso k de la Homaro.

# Klara respondo al tikla demando

En la plej multaj leteroj, kiuj ĉiutage alvenas al nia Redakcio, oni povas legi la saman demandon: «Kial daŭras tiel longe la milito?»

Kamaradoj: ĉu vi vere deziras ekscii, kial daŭras tiel longe la milito? Nu, bone: La milito daŭras tiel longe, ĉar viaj registaroj interkonsiliĝis por malebligi la justan sindefendon al la hispana popolo kontraŭ la perfidaj generaloj, kiuj ribelis kontraŭ sia propra patrio. Oni malpermesas al ni akiron de armiloj dum al la ribelintoj oni havigas ĉiom, kiom ili deziras; ĉu vi ne sciis tion?

Daŭras la milito, kamaradoj, ĉar al la internacia demokratio mankas la necesa kuraĝo por alfronti la sitacion. Sciu: oni timas pli la revolución ol la faŝismon. Al la tiel nomataj demokratioj ni ŝuldas la iniciaton de la jam famiĝinta interkonsento pri «neinterveno», kiu nur favoris la faŝistemajn ribelintojn malebligante al ni rapidan venkon super ĉi tiu terura, monstra, nevortklarigebla batalo, en kiun ĉiuj aliaj demokratecaj landoj falus, se ni fiaskus. Ĉu vi jam tute atentis pri tio, kamarado?

Daŭras ankoraŭ la milito, eksterlanda samideano kiu korpremite legas ĉi tiujn liniojn febre verkitaj en la konvulsianta Hispanio, ĉar la kruela faŝismo – ni ripetu insiste tion, centfoje—ne konas skrupulojn k kiam per unu mano subskribas interkonsenton pri «neinterveno», per la alia havigas la plej modernan miltmaterialon al la ribelintoj sen timo pro tio al ies admono tial ke ĝi scias kiel disvolviĝas en frazoj la liriko de la t. n. demokratioj.

Daŭras ankaŭ la milito—la plej harstariga hombuĉado, kiun registras la Historio el ĉiuj epokoj—ĉar la internacia solidaro de la laboristaro al la hispanaj proletoj, batalantaj kontraŭ la internacia faŝismo, estas solidaro dankinda, sed ne sufiĉe efika por la graveco de ĉi tiu milito, tial ke ni ne luktas per butero, sed per **fusiloj** k **kanonoj** k ne estas per haringoj per kio ni gajnos, sed per **tankoj k aviadiloj**...

Ni kiel esperantistoj, kiel pacamantoj, devi paroli tiamaniere... Ni, kiuj kontraŭstaris eĉ al la armilaj ludiloj por infanoj! Sed, ni ne venigis ĉi tiun kataklismon, ni ne deziris militon; tial, kiu neos al ni la rajton sindefendi kontraŭ la plej monstra k sovaĝa atako?...

Kaj daŭras la milito, fine, kamaradoj, ĉar trans la Pirineoj ne ankoraŭ sufice atentis pri la tuta, pri la granda graveco tutmonda de la epokfaranta kontraŭfaŝista batalo de nia lando.

Kamaradoj: tial daŭras tiel longe la milito... Sed, spite ĉio, estu certaj pri nia triumfo, kiel ni estas certaj pri via klasa solidaro. Ni venkos! Kaj ni venkos, ĉar nun ni jam hardiĝis en la milito k ni luktos senlace ĝis kiam la faŝismo restos absolute neniigata el nia k el viaj landoj. La batalo, kiel dirite, ne estas nur nia, sed tutmonda.

Kamaradoj, nun ne jam demandu «kial daŭras la milito tiel longe». Vi jam scias tion.

Do, ekagu!!!

# MOZAIKO

En la sektoro de Robledo de Chavela, post longa batalo favora al niaj armeoj, estis trovitaj interesaj leteroj en poŝoj de arestitoj. Unu el tiuj leteroj, subskribita de pastro, diras: «Ni petegas Dion ke ilia mitralo ne trafu vin k ke la nia detruu ilin. Ni ĉiuj kredas ke dank' al Dio, ĉi tio finiĝos baldaŭ ĉar ni havas generalojn Franco k Mola, kiuj estas anĝeloj senditaj de Dio al Hispanio, por prepari la grundon kie deziras regi Jezuo.

—

En poŝo de aliulo estis letero, per kiu sciigas al amiko: «Antaŭ 15 tagoj falis en Calzadilla aeroplano, kies gvidantoj estis arestitaj Ili deklaris jene: Vi mortigos nin, sed vi ne eniros Madridon.»

—

Letero de fianĉino diras al faŝista soldato: «En Carrion estas senfina la nombro de tiuj, kiuj pagas per sia vivo, sian antaŭan politikan sintenon.»

—

La 19. Novembro, Julio Carrasco, komandanto de bataliono «Libero» detruis per manbomboj du italajn tankojn k kaptis la ses okupantojn. Pro tio li ricevis krucon de Milita Merito. Li apartenas al la Unuiĝinta Socialista Junularo.

—

La 16. Novembro serĝento Antonio Coll, ankaŭ per manbomboj detruis kvar italajn tankojn ĉe la Madrida fronto. Postan tagon li mortis dum nokta atako.

Ĉiutage pligrandiĝas la nombro da popolaj herooj, kiuj jam ne plu timas la faŝistajn armilojn.

—

Durruti, bravega estro de kolono kiu bonege batalis en Aragona fronto, k nun batalas en Madrida fronto, mortis sur batalkampo. La verkisto Ilya Ehrenburg, skribis:

«Alian fojon mi vidis Durruti 'n ĉe dometo proksime al Bujaraloz. Denove mi vidis liajn okulojn plenaj je volo k amo, k liajn grandajn manojn de laboristo. Apude funkciis kanonoj. Li parolis al mi pri rusa revolucio k sovetaj laboristoj, kiujn li multe amis. Li estis nia amiko, nia frato. Li estis vera revoluciulo. Kiam la malamiko proksimiĝis al Madrido, Durruti tuj alvenis defendi ĝin.

Post la ricevo de sciigo pri lia morto, mi vidis lin, viva, gaja, kuraĝa; k kiel lasta saluto mi diras al li: Vivu Madrido!»

—

La faŝistoj emfazas per siaj informiloj ke oni celas starigi ordon, k ili bombardas hospitalojn k muzeojn. Ankaŭ ili ĵetas bruligajn bombojn sur laboristaj kvartaloj.

—

Ĉiuj faŝistaj potencoj persiste intencas, pli k pli atakeme, detrui ĉiujn demokratiojn Nur forta digo staras antaŭ ili: la kuraĝa sinteno de Sovetio k la heroa batalo de hispana popolo.

Kion atendas Blum k kompanio? Kion atendas la «Trade Unions» de Anglio? Kion atendas la socialdemokrataj laboristoj de la tuta mondo, kiuj ne kuniĝas al siaj fratoj? ALVENIS HORO DE FINA LUKTO.

Aŭ, kun la hispana popolo, kiu luktas por nova laborista homaro. Aŭ, kun Germanio k Italio kiuj celas al barbareco k sklaveco.

## GRAFIKA PRUVO DE MALHOMECO



Ligna kesto kun la kripligaĵoj de aviadisto Galarza, kiun ĵetis la faŝistoj, per paraŝuto, sur Madridon

**Esperanto gaje fieras povi diri krie nun la veron pri Hispanio**

# RIGARDO AL ARIERGARDA URBO

### IMPRESOJ DE EKSTERLANDANO

Dum preskau tri monatoj k duono la tuta loĝantaro de Alikante trankvile laboris k apenaŭ serioze atentis la enlandan militon. Ja la milito ankoraŭ ne estas antaŭ la pordoj de la urbo. «Civila milito» estas misnomo, ĉar la milito ne estas inter du partioj da civiluloj, sed estas en unu flanko nur MILITISTOJ, kiuj militas kontraŭ la civila popolo.

La vivo estis dolĉa al la nepensema amaso. Gajo, senzorgemo, agrabla vivo, trankvileco regadis ĉi tie. La gvidantoj de diversaj laboristaj organizoj konsciis pri la graveco de la situacio; ili streĉe propagandis por varbi homojn al la volontula armeo. Kio do estis tio subite vekanta la urbanojn? Jen la sekreto. La faŝistoj mem frapis la risorton jene. Matene de la 5ª de novembro, je la 4ª horo, du faŝistaj aviadiloj bombardis la urbon ĵetante grandajn bombojn. Iuj bomboj falis en la maro k du trafis en la kajo, de kie metalpecoj difektis la hispanan ŝipon «Ciano», kies ŝarĝo estis karbo. Unu el la ŝipanoj estis mortigita.

Alia bombo falis sur la avenuo kaŭzante difektojn ĉe la fasado de la filio de la banko «Hispano Americano», kies nokta gardisto estis mortigita. Tra la tuta urbo aŭdiĝis la signalo de alarmo k estis estingitaj ĉiuj privataj k publikaj lumoj. Starante sur la balkono de mia loĝejo, mi povis superrigardi preskaŭ la tutan urbon; nenie mi vidis lumon, krom tiujn de la germana k itala militŝipoj, ankrantaj en la haveno. Tiuj du ŝipoj lasis ĉiujn siajn lampojn pompe lumantaj en la nigro.

Tiu epizodo je la 4ª horo matene vekis la dormantajn urbanojn, k nemultaj reiris al siaj litoj. Ĉiu viro en la urbo komprenis de nun, ke milito estas afero serioza. Miloj tuj enlistiĝis en la volontula armeo. Faŝistoj per la aeratako instigis ilin tion fari.

Ankoraŭ neniu en Alikante estas devigata enlistiĝi en la volontula armeo. Ankoraŭ ekzistas multe da libereco. Mi, anglo, estas nun tiom libera kiom mi estis en la jaro 1934. k 1935. Neniu demandas min kien mi iras; nur, se mi vojaĝus al alia urbo mi devus akiri specialan permesilon. Oni estas libera ĉi tie iri al iu loko laŭ la kaprico de sia volo.

Neniam iu haltigis min; neniam mi vidis soldaton aŭ iun alian homon ebria, aroga aŭ insultema. Kion nepre ni vidus dum nokto sur stratoj de aliaj urbegoj, tion mi neniam vidas ĉi tie. Fakte policanoj preskaŭ ne ekzistas; tamen, ĉio fluas en bona k paca ordo. Vi ne kredas al mi! do, venu mem al Alikante k kontrolu.

Hieraŭ vespere, mi iris al la ĉefa stacidomo. Kion mi vidis? Centoj k centoj da junuloj troviĝis tie, ĉiu en spirito de kamaradeco k gaja humoro, ĉiu havanta unu celon—iri al la fronto por defendi la laŭleĝe elektitan registaron, por defendi Madridon, por batali por sia idealo de justeco k Libereco—kun majusklo—. Hispanoj ĉiam insistas pri individua libereco. Neniu estas devigata iri militi, sed ĉiu memvole iras. La estontaj okupantoj de tranĉeoj jam estas kamaradoj. Iuj sidas sur la perono antaŭ la stacidomo k tiras el siaj pakaĵoj mangaĵojn. Kun rideto ili interŝanĝas manĝaĵojn k spritaĵojn; oni vidas, ke la plej sincera k fervora kamaradeco regas inter ili. Nenies mieno estas malgaja; neniu virino tie troviĝas kun larmoj fluantaj sur la vango; ĉu tia junularo povas esti venkata? Nur, se mankas al ili la necesaj armiloj. Tempo diros. Almenaŭ nuntempe neniu batalanto de la legitima registaro momente volas aŭskulti pri malvenko. Ĉiu fidas en si k en siaj kamaradoj. Neniu instigo por ataki aŭ por defendi estas necesa, ĉiu scias sian devon k estas preta plenumi ĝin. Ili batalas ne pro mono, ne pro gloro, sed por sia idealo de justo k libero.

Leganto, ne kredu ĉion, kion vi legas en viaj ĵurnaloj aŭ aŭdas per la radio. Kiajn falsaĵojn mi legis en alilandaj ĵurnaloj k aŭdis per radio el Seviljo, Italio k Anglio! Mi montru al vi kiel interesatoj mensogas k senhonte misgvidas fidemajn aŭskultantojn de la radio k legantojn de la ĵurnalaro. En oktobro oni disaŭdigis radie, ke Madrido falus antaŭ ol la fino de tiu monato. Fine de oktobro la ribeluloj ankoraŭ estis ekster la ĉefurbo. Poste, je la 10ª de novembro la radio-stacioj laŭte fanfaronadis al la kvar ventoj, ke «estas nur afero de horoj, ke la ribeluloj eniru en Madrido». Itala stacio diras «naciistoj». Kaj kio okazis? La ribeluloj ankoraŭ frapas por eniri en la urbo.

Kaj kion ni diru pri alia blufaĵo! —pri tiuj 17 ŝarĝveturiloj portantaj municiojn al la ribelula armeo, k kiujn la lojalaj trupoj dispecigis. Kion diris la estroj de la ribelula armeo? Legu, aŭskultu. Jen la ironio: «La trupoj de la defendantoj de Madrido detruis trajnon da ŝarĝveturiloj, portantaj manĝaĵojn al la loĝantaro de Madrido». Cinika fabelo por infanoj. Do, neniam kredu ĉion, kion vi legas k aŭdas, sed ĉiam kontrolu.

E. E. YELLAND

Alikante (Hispanio) 25-XI-1936.

## Progresema Esperantisto!

Certe estas intima plezuro vidi en realo la plenumon de io, kion oni forte deziris. Ni asertas, sen risko pri eraro, ke la eldono de nia bulteno POPOLA FRONTO, advokato internacia de afero tre nobla, estas por vi la materia formo de jama revo k aspiro pri efika uzo k praktika servo de nia komuna lingvo en la ŝaŭmanta ondaro de la aktuala vivo mem. Tamen ni masonas la konstruon sur la fundamento nur de nia entuziasmo k per la mona briko de ĉiu samideano konforma kun nia intenco.

Ni studas la elekton de peranto en eksterlando por centrigi la donacojn. Dume ankoraŭ nia maŝino bezonas rekte, por glita funkciado, la forton de via subteno.

Kolektu monon tuj inter ĉiuj amikoj, en ĉiuj grupoj, k sendu ĝin prefere per bankbileto aŭ ĉeko, eĉ per respondkupono, se aliel ne eblas, al nia jena financa adreso:

**ANTONIO PONT**

**Plaza Republica, num. 2.-Valencia (Hispanio)**

# Sango k mitralo

Funebro k doloro plenigas la koron de la Madrida popolo. Estas furioza la malespero de la malamiko, antaŭ la kuraĝo k arogo de nia Aerŝiparo, kiu celas, laŭ normoj pli humanaj de l' milito, ne al malfermaj k sendefendaj urboj, ne al la hospitaloj nek al la lernejoj, kiel faras la faŝistoj, sed al ties vivofontaj centroj, al aviadil-gardejoj, al armigitaj koncentriĝoj aŭ al stokejoj de benzino k municio. Niaj aviadistoj fluge serĉas tion en iliaj propraj nestoj mem, detruante, kun aŭdaco epopea, aeroplanojn k pormilitajn elementojn. La kolero k rabio de la monstro, pro sia fiasko antaŭ homoj aŭdacaj, estis febraĉa instigo por daŭrigi sian sangan tradicion, respondante per malkuraĝaj, malnoblaj agoj, nigraj kiel sia malhela animo.

Ili flugis super la ĉielo de Madrido, kaŝite de la nuboj por ne alfronti la pafojn de niaj trafaj mitraliloj kontraŭaviadilaj k faligis sur nian sendefendan popolejon sian mortigan ŝarĝon.

Virinoj k infanoj estas murditaj de la malamika plumbo. Kiomaj? Multaj! Sed ne gravas la nombro; ni konstatas la fakton. Inter la viktimoj falis eĉ dumonata bubeto. Li falis samtempe kun sia patrino, kiu estis doninta al li la vivon.

Premite de la patrinecaj brakoj, en finlasta ĉirkaŭpremo je defendo k agonio, lia mortlito estis la strataj ŝtonoj.

Fiheroa faro! Infanoj k virinoj falĉitaj de la rabobirdaĉoj, denaskaj metodoj de la internacia faŝismo.

Ĉu protestos la landoj, kiuj tiom sentemaj montriĝis pro la enkarcerigo de la kunkulpuloj pri tiom da krimoj, okaze de tiu monstra faro? Ĉu, Francio k Anglio sentos sin vunditaj en siaj humanaj sentoj.

Niaj viroj sufokis siajn larmojn; ili ja scias, ke temas pri lukto je morto, ke la malamiko estas malnobla k perfideca, ke nenion noblan oni povas esperi de tia fripono. Tamen el la fundo de ĉiu koro honesta leviĝas promeso pri venĝo, ĵuro pri respondo.

La murdistoj estas nun ĉe la sojlo de Madrido; ni iras serĉi ilin, ni iras neniigi ilian provokemon, ni iru ankaŭ venĝi niajn mortigitojn!

Gloraj flugiloj de niaj aviadiloj! Flugu alten, tiel alten kiel niaj aspiroj pri Justo, kiel niaj ideoj pri libereco. Konfirmu vian historion; daŭre trairu vian gloran tradicion kun respekto por la senarmaj vivoj, laŭ la humanecaj leĝoj de l' milito, konsiderante la hospitalojn kiel ion sanktan k netuŝendan, same ankaŭ la malfermajn urbojn, la sendefendajn vilaĝojn... Sed flugu je la necesa alteco, kiel vi faris tiom glore, tiom heroe k tiom trafe super la faŝistaj urboj... Energie detruadu la kavernojn de la faŝista besto; deŝiru ĝiajn ungegojn k ĝiajn bekojn, renversu ĝiajn flugilojn.

Faru la militon kiel homoj. Neniam forgesu, k la racio prezidas niajn agojn.

La malamiko intencos ankoraŭ flugeti sangavidece, sed ne gravas! Ni ĝin detruos k ĉiuj niaj mortintoj estos venĝataj.

Dolores Ibarruri (PASIONARIA)

— —

**Noto de la Redakcio.** — La ĉi-supra artikolo aperis en ĵurnalo la 14. de Novembro. La okazintaĵojn de la tagoj, kiuj sekvis, niaj legantoj jam konas per siaj naciaj gazetoj. Estas rimarkinde, ke la mortigaj flugadoj super la urbo ripetiĝis k okazigis senĉese senkulpajn viktimojn. Okazis ankaŭ interaeroplanaj bataloj super la hispana ĉefurbo.

# MENSA MALSANO

Iu kompatinda fiulo, kies cerbo kriple funkcias, sin turnas al ni per anonima skribaĵo el Parizo, kun insultoj k aĉaj esprimoj je la nomo... de la «interna ideo» de Esperanto (!?).

Estus ja ridige, se ni ne havus pli urĝan laboron k mankon de spaco, konatigi al niaj legantoj la sensecaĵojn, per kiuj tiu «Pacifisto kiu abomenas la ruĝan faŝismon» celas elpruvi sian nekuraceblan stulton. Ni nur diru, ke li plene sukcesas en sia tasko.

Koncerne la minacojn, kiujn li, brave kaŝita sub sia anonimo, elĵetas al ni, nia respondo estas la signifoplena k historia vorto de Cambronne.

# Grava Manifesto

Laboristoj de la tuta mondo: Solidaron al Hispanio!

Nia lando estas invadita de internacia faŝismo kiu plenumis la plej brutecan krimon, kiu registras la Historio. Pli ol 200.000 personoj estas fusilmortigitaj, post plej teruraj turmentoj, de kripligo ĝis bruligo de vivantaj korpoj.

Virinoj, infanoj k maljunuloj estas tranĉumitaj. Germanaj k italaj aeroplanoj bombardas vartejojn; fotobildojn aperigas ĉiaj revuoj. La kripligo de nia aviadisto Galarza, kies kripligita kadavro estis poste ĵetita en niaj vicoj, estus plej granda monstra fakto, se ne estus sekvata de la konstanta murdado al senkulpaj hispanoj. La noktaj bombardadoj, per bruligaj bomboj, kontraŭ nia ĉefa urbo montras la malkuraĝon de la faŝisto, kiuj ne kapablas venki nian popolon sur la batalkampo.

La hispanaj laboristoj verkas nun la plej glorajn paĝojn de la Historio. Per siaj nesufiĉaj elementoj ili kontraŭbatalas la germanan, italan, portugalan k hispanan faŝismojn k la ŝturmtrupojn elportitajn el Afriko.

La Ĝenerala Unio de Laboristoj proklamas laŭte tiun ĝis nun nekonatan barbarecon k sin turnas al ĉiuj laboristoj, al Socialista Internacio, al La Sindikata Internacia Federacio, al Komunista Internacio, al Ruĝa Sindikata Internacio, al Amerika Federacio de Laboro, al Amerika Federacio de Industriaj Laboristoj, al Internacia Asocio de Laboristoj, al Internacia Ruĝa Helpo, al niaj fratoj de Latina Ameriko, al ĉiuj laboristoj k kamparanoj sen partio nek organizo, al liberalaj intelektuloj; fine, al ĉiuj demokratoj, por ke ili leviĝu kiel sola homo k devigu siajn registarojn por ke nia Respubliko demokrata povu sin defendi kontraŭ banditoj k murdistoj.

Necesas ke tiu tutmonda protesto kontraŭ la faŝistaj monstraĵoj estu efika, nekontraŭstarebla, efektiva.

Laboristoj de la mondo: Antifaŝistaj intelektuloj: Se vi deziras konservi k pliperfektigi liberan situacion kiun la faŝismo celas detrui per maroj de sango:

**Leviĝu urĝe k helpu nin!**

**For la «ne interveno»! Por la libero k demokratio de la mondo!**

Ĝenerala Unio de Laboristoj

Direktanta Komitato

**AŬSKULTU RADIODISSENDOJN DE VALENCIO PRI HISPANA SITUACIO EN ESPERANTO!**

Stacio de Komunista Partio—ondlongo 41,87 metroj—marde k vendrede je la 17ᵃ horo (hispana tempo)

Stacio de Socialista Partio—ondlongo 41 metroj—lunde k sabate je la 12ᵃ horo (hispana tempo)

# Manifesto de la Internacia Brigado

Fratoj de Hispanio!

La Internacia Brigado sendas al vi varmegan k fratan saluton!

Ĉi tiu Brigado konsistas el laboristoj, kamparanoj, intelektuloj, el ĉiulandaj proletoj diverstendencaj, kiuj vere esprimas la sintenon de la popolamasoj de tuta Eŭropo. En nia Brigado ekzistas komunistoj, socialistoj, respublikanoj, demokratoj k eĉ ankaŭ katolikoj.

Ĉiuj landoj estas reprezentataj, ĉefe kiuj teroras pro sanga diktatoreco de la faŝismo: germanoj, italoj, poloj, hungaroj, portugaloj jugoslavoj, k. t. p. Ankaŭ estas reprezentataj demokrataj landoj: francoj, angloj, belgoj, svisoj, k. t. p. La membroj de Internacia Brigado venis volonte al Hispanio kun la sola celo k arda deziro helpi vin, helpi niajn heroajn hispanajn fratojn, defendi vian respublikon, vian liberon k vian sociordon.

Tial la Internacia Brigado, pro sia konsisto k pro sia celo, estas BRIGADO DE LA POPOLA FRONTO DE EŬROPO. Ĝi montras samtempe la batalunuecon de ĉiuj laboristoj k la unuiĝon de ĉiuj eŭropaj popoloj en sia komuna luktado por libero k paco. Ni bone scias, ke malantaŭ Franco k Mola — la perfidaj generaloj, malnoblaj murdantoj de l' popolo — staras malkuraĝe kaŝitaj, Hitler k Mussolini, kiel aborto de l' kapitalismo.

Heroaj fratoj de Hispanio!

Dank' al krima helpo, kiun plenumas ĉiuj faŝistaj registaroj al niaj malamikoj, la lukto ne nur rilatas al vi, sed al ĉiuj laboristoj de la mondo, kiuj batalas por la pano, paco k libero. Kun granda emocio, ni sendas al vi nian saluton, sindonaj fratoj de Hispanio! Ni ŝatas vian kuraĝon k tiun de viaj heroaj virinoj. Frakasante hispanan faŝismon ni defendas demokration k liberon de la mondo. Kuraĝaj, admirindaj defendantoj de Madrido, ni salutas vin! Madrido estos la tombo de hispana faŝismo! Hispanio estos la tombo de tutmonda faŝismo!!

Ĉar ni estas konvinkitaj pri tio, ĉar ni posedas fratecan spiriton, en la lukton ni alportas vivoplenan solidaron, la sinceran solidaron de sango komune verŝita, proleta sango de l' ĉiulandaj proletoj...

Ni luktos brako en brako, ni luktos k ni venkos, fratoj de Hispanio!

Mario NICOLETTI

Politika komisaro de la Internacia Brigado

## NIA MUNICIO

| | |
|---|---|
| Valencia Esperantistaro. . . | 525 ptoj. |
| F. A.—Cocentaina. . . . . | 4 » |
| F. G.—Sueca. . . . . . . | 2 » |
| «Nova Sento». - Barcelono. . | 12 » |
| E. Y. - Alicante . . . . . . | 5 » |
| M. C.—Almazora . . . . . | 3 » |
| F. M.—Barcelono . . . . . | 2 » |
| I. S.—Benisano. . . . . . | 5 » |
| P. S.—Orihuela. . . . . . | 5 » |
| W. Esp. Movement.-Londono. | 10 ŝil. |
| Geamikoj el Zwolle . . . . | 10 guld. |
| P. H. M.—Birmingham . . . | 1 funto |
| S. W. A.—Karlskoga. . . . | 5 svkr. |
| A. N.—Amsterdam. . . . . | 10 guld. |
| Vincent.—París. . . . . . | 50 ffr. |
| FLE. Sekcio 5.—Rotterdam . | 3 dol. |
| Esp. Societo el Dallington. . | 5 ŝil. |
| T. S.—Glasgow. . . . . . | 2 ŝil. |
| J. B.—Walton . . . . . . | 1 ŝil. |
| FLE. Sekcio 2 Rotterdam . . | 2 dol. |
| L. C.—Toulouse . . . . . . | 50 ffr. |
| W. Ch.—Edinburg. . . . . | 4 ŝil. |
| E. L. O.—London. . . . . | 5 ŝil. |
| FLE. Sekcio I.—Rotterdam. . | 60 ffr. |
| J. S. R.—Wandre . . . . . | 50 belgf. |
| FLE. Sekcio 15.—Rotterdam . | 5 svdkr. |
| J. S.—Poruba . . . . . . | 20 kĉ. |
| F. J.—Aneby. . . . . . . | 5 svdkr. |
| Samideanoj el Jaligny. . . . | 50 ffr. |

Krom tiuj monaj donacoj, ni recevis k ricevas multajn respondkuponojn de diversaj amikoj el diversaj landoj. Al ĉiuj kvitance ni dankas!

LA ADMINISTRACIO

# Lasthora Impreso

La ĝenerala situacio videble pliboniĝis. La danĝero pri la kapto de Madrido ne estas ja tiel angora kiel dum la apero de nia lasta numero.

Faŝistaj flugmaŝinoj daŭras sian kruelan bombardadon sur lojalaj urboj, ĵetante, mortigan ŝarĝon, sen milita celo, kontraŭ civila loĝantaro.

Nia premo aktiviĝas vigle en Asturio k Aragono. La popolo, pro sperto, akiras konscion k akceptas senplende, kun fiero, la malagrablaĵojn de la milito. Sed en plena konvinko pri absoluto venko.

La registaro en Valencio, kun bona disciplino, gvidas serene la militon.

Nia urbo akiras aspekton de vigla oficiala ĉefurbo. Nia penado estu efika! En la kruda vintro estas varmo karesa la helpo de la proleta mondo.

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia

## POPOLFRONTA LETERUJO

E. E. Y. - Danke ni akceptis vian kunlaboraĵon, sed pro bezonoj de spaco de nia malmultpaĝa revueto, ni nepre devis redukti ĝin.

Al kelkaj korespondantoj.—Se ni devus atenti ĉiujn sugestojn k komplezi ĉies dezirojn, necesus eldoni 16-paĝan ilustritan revuon ĉiusemajnan. Monhelpu por ebligi tian bultenon! Ju pli da mono ni pridisponos des pli riĉenhava fariĝos nia nun modesta gazeto duonmonata.

Al katalunaj samcelanoj.—Por informi svedan k-don. havigu al ni sciigojn, se eble, pri Josep Tuset k Ignaci Lladó, ambaŭ el Manresa. Antaŭdankon!

E. E.—Gotebor.—La portreton ni reproduktis de alia ĵurnalo k kredas ke vi povos fari la samon el la nia. Ni ne posedas la kliŝon jam.

C. M.—Utiel. - Ĉar niaj paĝoj estas nesufiĉaj por la celo de la bulteno, ni bedaŭras ke ne estas eble enpresi anoncojn. Interesan mallongan raporton eventuale ni akceptus.

S. E. U.—Moskvo.—Laŭeble ni atentos viajn indikojn rilate la enhavon de nia gazeto. Ni multe esperas pri via helpo.

J. B.—Rotterdam.—Via longa letero pruvas, ke vi estas observema k pripensema homo kun nobla spirito. Sed tial ke la lasta parto de la skribaĵo neniel alĝustiĝas al la realo de la faktoj, ni bedaŭras, ke vi estas fuŝe informita. Ne sub Azaña (kiu mem estis enkarcerigata k senindulge persekutata) sed sub Alcala Zamora, okazis la Asturia k la Kataluna ribeloj en jaro 1934, dum kiu la registaro Lerroux-Gil Robles sufokpremis la popolamasojn per afrikanaj k legionaj trupoj.

G. M. K. - London.—La leteroj bone alvenis k ni dankas, sed ne alvenis la mono. Ĉu vi forgesis enmeti ĝin?

M. B. — Levallois. - Poŝtmandato anoncita per via bildkarto ne alvenis. Prefere sendu monon en bankĉeko aŭ monbileto. Bv. Informi nin pri via monsendo.

E. L. O. Ealing. — London.—Via monsendo ĝis nun ne trafis nin. Kian vojon vi uzis?

F. Th.—York.—Ni ne ricevis vian anoncitan monsendon. Viajn vortojn ni dankas.

J. G.—Bresand.—Via plano plaĉas al ni k ni petas vin agi rapide.

H. O.—Amsterdam.—Ni dankas la saluton de via Grupo. La monsendon, kiun vi anoncas, ĝis nun ni ne ricevis.

L B - Wormerneer.—Ni notas vian deziron, sedla monsendo ne ankoraŭ trafis nin.

K S.—Wormer.—Ni agos laŭ via deziro. Monon sendu nepre per bankĉeko au monbileto en rekomendita koverto.

M. C.—Axvall.—Vian poŝtkarton ni bone ricevis, sed ne la respkup.

A. V. Amsterdam.—Ni scias, ke li bonfartas k loĝas en la sama adreso.

Sekcio 5-a. F. L. E.—Amsterdam.—La enhavo de via letero estas en bona ordo. Dankon!

Senlaborlaborista Movado. — London. — Kortuŝite ni legas vian leteron k dankas.

J. D - Soissons. Respondkuponoj alvenis k bone taŭgas, sed dum al vi kostas multo por ni estas malmultvaloraj. Prefere sendu monon per bankĉeko au monbileto, post kunmeto se necese de mono el kelkaj donacantoj.

Tiu rekomendo validas ankaŭ por ĉiuj pridemandintoj. La izolitaj k-do., tamen, povas sendi respondkuponojn, ĉar al ili estas pli facile se temas pri eta sumo.

I.ª JARO N.º 4 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 15 DECEMBRO 1936

# PoPola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO K ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)

## INTRIGO DE LA DIPLOMATARO

Kvin monatojn jam atakas vane k furioze la faŝismo internacia en Hispanio. Faŝismo estas milito! Jen devizo malnova, kiel vera signalo de terura danĝero. Nur la klara instinkto de popola klaso flaris la haladzon k eligis raŭke siatempe la angoran krion.

Hispanio, bedaŭrinde, spertas en ŝiraĵoj de sia karno la pravon de tiu averto. Kun stranga miro, la mondo honesta povis rigardi hontigan spektaklon: Legitima registaro de klera popolo ne povis, eĉ per oro, aĉeti armilojn, por leĝa defendo de sia reĝimo, dum faŝista armeo ribeliĝinta, kun helpo de abunda materialo, senbare ricevita de sia eŭropa kolegaro, ebenigis detruaĉe duonon de la lando. Krevis makule la mitralo en blua ĉielo.

Ha, se la ribelintoj estus laboristoj! Je nomo de ordo, ne mankus livero de subpremiloj, sen vanta funkciado de fikcia komitato pri ne-interveno.

Malgraŭ diplomata bojkoto, spite manovrojn k intrigojn, kontraŭ kaŝa malhelpado k cinikaj provokoj, la popola bloko haltigis la paŝojn de la monstro k avare defendas la nacian ĉefurbon. En mezo de frosto k neĝo de vintro fiaskas la krima aventuro, kiu naskiĝis dum varmo somera.

La scienca tekniko milita, de la stabo de l' ekspluatismo, ne povis, ne povas!, detrui la muron de korpoj proletaj, en armeo rapide, senzorge, aranĝita, kiu tamen sukcesis jam atentigi finfine la grandajn ŝtatojn pri la efiko morala, en sociaj malriĉaj tavoloj, pro la tre gravaj sekvoj en la politiko de Eŭropo okaze de, certa por ni k eĉ jam ebla por ili, popola venko en Hispanio. Post la farso de senutila komitato, aŭdiĝas jam en kancelarioj la susuro diplomata pri iu provizora konsento de batalhalto inter la normala registaro k la faŝistaj generaloj perfidaj al sia ĵuro k al sia patrio.

Tio estas nur hipokrita diplomata manovro, kun la celo eviti timeme, ke la hispana flamaro estu lumo en tuta Eŭropo dank' al fiasko brua de lama politiko en emfazaj nacioj, kiuj, pro siaj cedoj ai internacia faŝismo, malebligis, al legitima registaro de kuraĝa popolo, sufoki la ribelon tuj ĉe la komenco. Nun certe, nigraj nuboj ŝvebas super Eŭropo, sed la hispana milito ne estus kreskinta tiel intense se Francio k Anglio, en la unua momento volus vidi reale la ekziston de nia normala registaro.

La sekvojn de ilia eraro ni ne plu devas pagi. La hispana popolo deziras k avidas pacon sed ĝi ankaŭ bezonas obstine fortranĉi unue eĉ la radikojn de tradicia militarismo, aŭtoro de apoteoza tragedio.

La kaŭzo de tiu intrigo estas la absoluta fiasko de faŝistaj bandoj en la sojlo de Madrido. La ekonomia situacio de la ribelintoj estas katastrofa, pri ĉi tio jam atentas la fremdaj financintoj, en granda paniko, pro risko perdi la kapitalon, kiun ili liveris, tro facile antaŭ la supozo de facila venko, por aĉeto de materialo por mortigi hispanojn.

Ne! Ĉu belajn kombinojn teksadi kun tiuj, kiuj divenas la pereon k deziras kanajle ripozon por denova skuo kontraŭ Hispanio? Neniam, tute ne! Ili devas klini la kapojn antaŭ la legitima registaro. antaŭ la leĝo! Ĉiu alia intenco estas groteska ĵonglo, kiun la popolo ne estas preta akcepti.

Nek per sentimentalaj risortoj sukcesos Parizo aŭ Londono konvinki la hispanojn verki harmonion kun tiuj friponoj konscie kovrantaj je sango, funebro k ruinoj la ĉarman amplekson de nia lando.

Ni ja taman ne devas malatenti la supektindan subitan intereson, de Francio k Anglio, pri nia afero. Ni ne povas, nek volas, kun rajto k leĝo en la mano, trakti jam kun banditoj sen honoro, sen konscienco, sen io komuna kun homa kondiĉo. Kia honto do! La leĝo estus moko. La leĝo devas serene funkcii k Hispanio, historie brava lando, malgraŭ ĉia intrigo, restos libera por ĉiam je generaloj perfidaj, nobeloj vantaj k episkopoj sen religio, kiuj makulis per sango k puso la paĝojn de nia historio.

## En la unua vico!

En Valencio, k ceteraj lojalaj urboj, sur la domaj fasadoj gaje petolas brilaj koloroj, en grandaj afiŝoj, kun severaj admonoj k sobraj devizoj pri malavara apliko, por nia epopea milito kontraŭ la faŝismo, de ĉies energio k ĉies kapablo.

Esperanto, branĉo de simbola demokratio en la arto, la scienco k la kulturo, ekbatalis tuj unuavice tra la specifa loko de sia lingva potenco.

Estas saĝe dirite, ke la movon oni pruvas per movo. En la unua vico de milita fronto k tasko konscia ni aplikas la ekzemplon de nia fervoro. Sur ondo de stratoj manifestacioj, en salonaj kunvenegoj, la verda makulo de nia standardo estas gvida emblemo je venko, rapida k frua, de ardaj k noblaj aspiroj. Saltetis naskiĝe nia revueto, utila frukto de kroma laboro de ĉiuj ni, jam tro malmultaj grupanoj, ariergarde restintaj, kun fortoj tro elĉerpitaj, kvankam ankoraŭ obstinaj, por ne perdi la honoron okupi postenon en la unua vico.

Dum la hispana Ministro de eksteraj aferoj plede parolas en Genevo al splena oscedanta diplomataro, stranga speco vivanta en komforto k lukso; ni, baraktinte en fluoj de kolero k indigno, kun febro en la kapo k tremo en la mano, grupigas literojn en frazojn honeste vundigajn por rekte senpere paroli al veraj konsistigantoj de ĉiuj popoloj. Nia voĉo estos karesa susuro en la intimeco de humilaj proletaj hejmoj. Tondra voko de libero inter la brua turnado de radoj k maŝinoj en fabrikoj, en kvietaj bienoj sur kampo k monto, aŭ en mezo de vigla konversacio en kluboj k sindikatoj.

En la unua vico de la esperantismo, ni ĵetas pomile reflektojn de lumo tra densa nubego de falsa informado per krimaj mensogoj. Kalumniado internacia, laŭ perfekta tekniko kapitalista, injektis la venenon de dubo eĉ en la koro de kelkaj esperantistaj mezklasanoj. Ŝmiro de milda balzamo estos certe por ili la akiro de vero.

En la unuaj vicoj, kiel parto plej sana de klaso popola, ni luktas, laboras k mortas, samtempe oni sonĝas...

Flaman saluton al ĉiuj, aserton sinceran de firma konvinko pri baldaŭa venko, aklamon al nova aŭroro socia, sendas ni, adeptoj de alta idealo, dum paŭza deĵoro, en la unua vico!

Atentu vi, almenaŭ, la eĥon de nia sopiro. Meditu k laboru konsekvence!

# MOZAIKO

● Nia glora popola poeto Garcia Lorca mortis, fusilmortigita de la faŝistoj, en Granada.

Dum batalo en Madrida fronto, ankaŭ mortis la fama skulptisto Emiliano Barral.

Pace ripozu tiuj du viktimoj de la «faŝista civilizo»!

● Hispana registaro diras per manifesto al nia popolo:

«De nun perfidulo Franco havas oficialan agnoskon de Berlino k Romo. Tiamaniere la pormilitaj fortoj antaŭeniras emfaze, inter la malkuraĝo de demkratiaj landoj, al starigo de faŝista hegemonio en okcidenta Europo. Sed samtempe la rolo de Hispanio kiel bastiono de demokratio kreskas gigante».

«Faŝista Italio, kiun la ligo de Nacioj denuncis kiel ATAKINTA ŜTATO, kiu iniciatis en Abisenio la taktikon detrui amase civilulojn, kiel oni faras nun en Madrido (ne atingante la celitan senkuraĝigon), trovis en Franco la kunkulpulon, kiun ĝi bezonis por provi la aldonon de Balearaj Insuloj al Imperia Krono de Etiopio.

Kun ĝi kunlaboris Germanio, kiu majstras la arton perfidi traktatojn, kiu forestas la ligon de Nacioj ĉar tiu baras ĝiajn atakemajn celojn; ĝi serĉas, en kunlaboro kun perfidaj generaloj, la krudaĵojn, kiujn ĝi bezonas por almiliti la naciojn, ne submetiĝintaj al ĝia regado.

Por civilizi Hispanion ili uzas marokajn trupojn, k tiuj, kiuj subskribis, kune kun Hispanio, traktaton pri protektorato al Maroko, SILENTAS».

● Japanio, Germanio k Italio interkonsentis pri reciproka helpado por kontraŭbatali komunismon.

Kiel prave asertas usonanoj, ĉiu registaro devas solvi interne siajn enlandajn politikajn situaciojn.

Ĉar tiu interkonsento celas nur altrudi faŝismon al ĉiuj, kial ankoraŭ ne venis taŭga momento por starigi demokratian interkonsenton?

● Germana registaro helpas malkaŝe la ribelintojn. Germana bataliono por aera defendo alvenis en Marokon; ĝi konsistas el dek du kanonoj k 800 soldatoj. Kirasŝipo «Emdem» k du ŝarĝŝipoj kondukis el Hamburgo armilojn k soldatojn al ribelintoj.

Sed malgraŭ ĉio, Germanio apartenas daŭre al Komitato por la «ne interveno».

● La glora verkisto Romain Rolland sendis al ĉiuj popoloj ŝirigan, kortuŝantan alvokon pri helpo al Madrido, kies estas jenaj frazoj:

«Terura krio eliras el bruligitaj ŝtonoj de Madrido. La fiera urbo kiu regis iam duonon de Malnova k tuton de Nova Mondo. (kiu ankaŭ estis radianta lumturo de okcidenta civilizo), estas atakata de armeo konsistanta el afrikaj maŭroj k fremdlegianoj...»

«Hospitaloj k muzeoj falas sub bruligaj bomboj; kun sia popolo denove mortas Velazquez.»

«Kiu povos haltigi ĉi tiun bruladon se oni ne estingas ĝin ĉe la komenco? Ĝi pereigos la tutan mondon.»

● Nia ministro de Maro k Aero publikigis noton per kiu plendetale oni priskribas la atakon al niaj militŝipoj ankrumitaj en Cartagena, fare de du fremdaj submarŝipoj; k ĝi asertas ke germanaj k italaj militŝipoj persiste neebligis, aspektante normalajn manovrojn, la movojn de niaj militŝipoj kiuj pro tio ne povis ofte atingi ĝiajn militajn celojn.

● Interne de la domo kie kuŝis en Madrido la germana ambasadorejo estis arestitaj 45 faŝistoj, kiuj fortikigis ĝin k estis provizataj grandkvante je ĉiaspecaj armiloj k veturiloj. Ili intencis militrezisti ĝis eniro de faŝistaj trupoj en la urbon.

● Ĉirkaŭ 300 diverstendencaj hispanaj kontraŭfaŝistoj enkarcerigitaj en Portugalio, estis kondukataj per ŝipo «Miassa» al insula malliberejo.

La nombro da rifuĝintoj, kiujn sendis en koloniajn malliberejojn la portugalia diktatoro Oliveira Salazar, jam atingas la ciferon 1400, kiu pruvas ke portugalia registaro ankaŭ bone praktikas la «ne intervenon».

● El respondoj de generalo Kleber al gazetisto kiu intervjuis la estron de Internacia Brigado, ni citas jenon:

«Mi venis en Hispanion ĉar necesas kontraŭbatali la faŝismon kie ĝi furiozas. Venkinte ĝin ĉi tie ni evitos novan eŭropan militon.

Popolo, kiu defendas sian historian destinon, sian liberon k sian sendependon, rajtas venki. Faŝisma venko en Hispanio signifus koloniigon fare de la germana k itala imperiismoj.»

● La fame konata verkisto k esperantisto Ludwig Renn, kiu komandas batalionon Thaelmann, diris jene:

«Unueca agado en nia bataliono ne estas problemo ĉar ĉiuj niaj kamaradoj havas perfektan disciplinon

Momente nur ekzistas baro, pro la diverseco de lingvoj, sed ni grupigos ĉiujn laŭ respektivaj landoj por solvi la aferon.

Se ĉi tiu milito estus vere civila milito baldaŭ finiĝus; malgraŭ ĉio la faŝistaj landoj estos venkitaj de internacia solidaro.

Pro tio mi venis ĉi tien; hodiaŭ nia patrio estas Hispanio.»

● Grupo da anglaj deputitoj, konservativaj k laboristaj, vizitis nian urbon dum nia konstitucia Parlamento funkciis. Poste ili vizitis madridan batalzonon kie ili povis konstati verajn sciigojn.

Ili ja vidis propraokule faŝistan bombardadon al civilaj enloĝantoj; ili vidis kiel la ribelintoj bruligis k kanonpafis nebatalantan zonon; ili vidis ke faŝistoj jam uzas venengasojn, k. t. p.

Konsekvence ili petis telegrafe al Londono urĝan sendon de kontraŭgasaj maskoj, k per radioparolado promesis solene peti al ĉiuj landoj helpon por mildigi k ĉesigi la sekvojn de ĉiuj faŝistaj monstraĵoj.

Ni ne multe fidas al sukceso de tiu tasko ĉar Anglio, pere de la «ne interveno» celas eviti eŭropan militon, ne atentante ke per tia konduto ĝi akcelas la alvenon de terura mondmilito.

● El domo apartenanta al la Legacio de Finnlando en Madrido oni ĵetis du bombojn, la 1. k la 3. Decembro. Sekve de tio la domo estis traserĉata trovante tie 567 faŝistojn k grandan arsenalon. Estas konstatinda fakto ke multaj eksterlandanaj diplomatejoj protektas aŭ helpas ĉiel ajn faŝistojn.

● Ĉiutage elŝprucas novaj batalantaj tanko-ĉasistoj, kiuj ripetas la kuraĝan faron de heroa Antonio Coll. La faŝistoj perdis 12 tankojn ĉe madrida fronto dum kvar tagoj; kelkaj el ili estis tuj utiligataj.

Rekorduloj estas jam pri tiu tasko: K-doj. Grau, Cornejo, Molina k Carrasco. Ankaŭ reliefiĝis José Vilaró, kiu ĉasas tankojn per mitralilo. Ili prave estas nomataj «La hispanaj maristoj de Kronstadt».

● Hispana Ministro de Instruado deklaris antaŭ aro da francaj katolikoj, ke se ili ne konsideras kiel fratojn tiujn, kiuj perfidas sian patrion, kiuj transformis preĝejojn je fortikaĵoj, kiuj praktikas Kristanismon per masakro de infanoj k virinoj, k kiuj vendas pecojn de sia lando; ili povas prave aserti ke la sinceraj katolikoj ne estas persekutitaj en Hispanio.

● Germana katoliko opinias: «Kristanismo estas popola religio ĉar devenas de subpremita popolo, sed Eklezio alprenis de l' Kristanismo tion, per kio ĝi povus sin defendi de Kristo. El religia sento ĝi kreis materialan forton; sed hispana milito pruvas i. a. ke vera Kristanismo havas nenion komunan kun Romo. Kie estas la popolamaso tie estas aŭtentika Kristanismo, sinceraj katolikoj nepre estas bonaj popolfrontanoj.

Tion diris K-do. Karlo Weiner, germana aktiva katoliko kiu batalas en defendo de Madrido, en la 12ª Internacia Brigado.

**Hispanio sangas nun konvulsie en defendo de via propra libero!**

# MAŬROJ!

Al la faŝistaj hordoj de Franco ekmankis la maŭra karno por kanonoj. La indiĝenoj el Maroko komencis elĉerpiĝi. Fariĝis malfacile eligi ilin el siaj triboj. La kompatindaj rifanoj jam ne plu estis trompeblaj per falsaj promesoj pri postvenkaj donacoj de grundoj k arabaj preĝejoj sur fruktodona Hispanio. La maŭroj ektimis aliĝon al la vicoj de la faŝistaj generaloj. Ne plu eblis, do, daŭrigi la rekrutadon de maŭroj en la ĉirkaŭaĵoj de la blanka urbo Tetuano nek en la pordoj de la sankta urbo Xauen. La perfida sultano mem ektimis pri sia propra vivo. Liaj regnanoj, tre cedemaj kun la ordonoj de la Korano, kiu devigas ilin al blinda obeemo al la Senditoj de l' Profeto, kontraŭstaris al la superaj ordonoj, eĉ se ĉi lastaj estis anoncitaj ĉe la sojlo mem de la Moskeoj.

Oni devis iri pli internen. Oni devis rekruti kompatindajn mahometanojn, ekspluatatajn pariojn. Ne gravis, se por tio oni devis eliri el la hispana teritorio. La makleristoj pri arabaj gentanoj senpune trapasis Uxda' n, k en la departemento de Orano, de Saida ĝis Colom-Béchar, la faŝistoj rekrutis pliajn maŭrojn per la faŝista mono k kun la permeso de la alĝeriaj aŭtoritatoj.

Alĝerio estas la dorlotita kolonio de Francio. Sed tie la vigla Francio de la Popola Fronto, la aŭtenta Francio maldekstrula, havas malmultan influon. Tie, «francistoj», «camelots du roi», «croix de feu» k la tiel nomataj sendependaj respublikanoj estas kiuj regas k sin trudas. La urbestro de Orano estas pastro. Li estas abato, kiu ne forlasas sian klerikan kostumon eĉ dum frivolaj diboĉadoj, al kiuj li tre multe emas. Abato, kiu, kompreneble, forpelis el la urbodomo la izraelidojn. Ne kontenta per tio, de tempo al tempo, li ankaŭ ĝojas koliziigi ilin kun la araboj, por ke povu amuziĝi la «francistoj», la «camelots du roi» k ĉiu aliaj friponoj, kiuj sentas admiron pri la bela Hitler.

En Sidi-bel-Abbés — malgranda urbo de la Orana departemento—, la hispanaj faŝistoj, kun fia helpo de siaj francaj kolegoj, donis teruran batadon al la konsula reprezentanto de Hispanio. Tio okazis antaŭ kelkaj semajnoj, dum la pedeloj de Johano March, la financinto de ĉi tiu milito, sin dediĉadis libere al la rekrutado de maŭroj por sendadi ilin, tra Uxda, al urboj Melilla k Ceuta.



INTER «KRISTANAJ» PASTROJ
—Tiu stultulo neniam sciis ion pri Politiko

Ne estos malfacile supozi, ke la enviciĝo de arabaj dungatoj fariĝis sen grandaj penoj. Kiel kontrasto al tio, ni havas informojn, ke oni bojkotadis oficiale monkolektojn k manifestaciojn favore al Hispanio, al la aŭtenta Hispanio, respublikana k laborista, kiu luktas por ĉies libero.

Socialistoj, komunistoj k naciistaj junuloj arabaj protestis vane. La abato Lambert, kiu prezidas la Konsilantaron de la urbo Orano, ne volas aŭdi pri tio. Li estas, kompreneble, je la dispono de Hitler k Mussolini.

Laŭŝajne, la franca registaro ne volas miksiĝi en la alĝeriajn aferojn, ĉar ĝi volas eviti super ĉio koliziojn inter araboj k judoj. Sed, en realo, tio estas nur la oficiala preteksto, kiun la reakciaj alĝerianoj prezentas al Blum.

Plue, al la terposedantoj k kapitalistoj el Alĝerio interesas tre multe, ke la konkurenco de la hispanaj oranĝoj k aliaj produktoj ne estu ĝeno en iliaj sendoj al Francio. Kun la milito k kun la dezirata ruiniĝo de la valenciaj kampoj, Alĝerio faros grandajn negocojn. Kiel, do, la alĝeriaj kapitalistoj ne helpos por ke la marĉandistoj de homa karno povu varbe rekrutadi pli k pli da maŭroj?...

Ĉe la ekapero de maŭroj el Orano en la sojlo de Madrido ties defendantoj ekhavis ian surprizon. Ili sin demandis, se eble al Franco finiĝis «la aliaj maŭroj». La proletaj partioj ĉiam estis tre solaj defendantoj por la maŭra popolo. La stranga fakto ne devas mirigi ilin, ĉar, eble, iun tagon, ili ekvidos eĉ abisenaj «askarioj» en la pordoj de Madrido. Ĉio estu por la bono k prospero de la «nacia» k «katolika» movadaĉo!

KOMENTARIOJ

## Ekonomia Kerno

La politika celo de germana k itala imperiismoj, rilate al hispana lukto, estas bone konata. Ili celas starigi en nia lando, fortan bazon por la daŭrigo senĉesa de siaj militaj planoj.

Pro la kutimaj hezitoj, kiuj konstante ornamas anglan k francan politikon, tiuj imperiismoj havis glatan, senbaran vojon al sia celo. Abisenia konflikto, Versajla traktato k germana rearmigo estis ŝtupoj facile surpaŝitaj de tiuj arogaj faŝismoj, kiuj facile kredas ke per sinsekva minacado baldaŭ ili estros la mondon.

Sed ili ne celas mastri la mondon pro politika vanto nek pro sentimentala deziro pri rasa subpremo. Laŭtegaj proklamoj de tiaspecaj motivoj, alvokoj al ordo k preĝoj al dioj, zorge ŝirmas ekonomiajn kaŭzojn, kiuj nepre ekzistas en ĉiaj militoj.

Angla k franka gazetaro priskribas detalojn, kiuj konkrete spegulas la veran sencon de germanaj planoj. Germanio helpadas, sendas armilojn k sendas soldatojn, sed tuj post la venko ĝi sendus fakturon, kies koncernan pagon ĝi facile sukcesus atingi de lakeaj generaloj.

Industriaj gravuloj ellaboris planon laŭ kiu Germanio ekonomie prosperos per sistema dujara ekspluatado de nia lando. Kavalkado de milionoj, kiuj nuntempe vojaĝas, per senĉesa helpado, poste revenos en fantazia nombro sub diversaj formoj; metalaj krudaĵoj, industriaj mendoj, intensa migrado...

Germanio aranĝos per sia milita arto fortan Hispanion, kiu efike povos helpi faŝismon dum proksima «plena milito», kiun anticipis Ludendorf. Por atingi tion germana industrio konstruos ĉi tie fortikaĵojn, aerodromojn, specialajn kazernojn, ktp. precipe apud franca landlimo. Nedubebla pruvo, pri ĉi tio dirite, estas, ke aera linio de Seviljo al Afriko jam estas mastrumata de germana kompanio.

Krom absoluta regado de mediteranea maro, Italio pretendas ekonomian celon, kies gravecon ni rimarkigas: Mussolini aspiras absolute kontroli produktadon de hidrargo.

Antaŭ la milito italoj produktis kvaronon de l' tutmonda produktado k hispanoj pli ol trionon; per hispana k itala produktadoj, bone organizataj, la internacia faŝismo rapide atingus kruelan monopolon pri neofta metalo, tiom necesa por milita industrio.

Eble estas ankoraŭ aliaj neaperintaj ekonomiaj celoj, per kiuj faŝistaj landoj intencas angore savi ekonomiojn, rapide velkantaj pro faŝisma sistemo; sed vane ili penas ĉar nuna luktado naskos tre baldaŭ radiantan triumfon k fina venkado de tutmonda demokratio.

# FAŜISTA PATRIOTISMO

Sub tiu sama titolo, angla deputito John Strachey verkis sekvantan artikolon:

«Granda sektoro de brita gazetaro jam ne plu volas nomi hispanajn faŝistojn, «ribeluloj». Vere mi opinias, ke tiu vorto «ribeluloj» estas tro nobla; ĝin oni ne povas apliki al hispanaj generaloj. Sed «Daily Mail» k aliaj similaj gazetoj ricevis ordonon nomi ilin «naciistoj», «ribelpatriotoj» aŭ «patriotoj». Nu, bone: la vorto «patrioto» signifas amanton al sia lando. Ni ĉiuj estas veraj amantoj de nia lando; tamen, dank' al «Daily Mail» ni sciiĝis pri vera senco de «patriotismo».

Por meriti nomon de naciisto aŭ patrioto, estas simpla formulo: Oni mendas ducent bombardajn aeroplanojn al fremda registaro, kiu estas preta sendi ilin; oni dungas fremdajn aviadistojn k oni provizas ilin per la plej teruraj k efikaj mortigiloj; poste oni sendas ilin flugi super la ĉefurbo de propra lando, kun ordono neniigi la enloĝantojn per infera pluvo de likva fajro.

Alia formulo konsistas el rekrutigo de salajrata armeo el la ĉiamaj malamikoj de la lando, transporti tiun armeon tra la koro de l' propra lando, bruligante ĉion k murdante ĉiujn, ĝis la pordoj de l' ĉefurbo.

Tiuj du formuloj entenas la esencon de patriotismo tiel, kiel oni ĝin komprenas en jaro 1936. Tiaj estas la kondutnormoj de patrioto, kiu tiel povas agi dum eŭropaj registaroj ne aŭdigas eĉ susuron de protesto.

Ĉiutage grandaj ĵurnaloj fervore alvokas patriotismon de l' popolamasoj; se iu kuraĝas dubi pri la devo batali por sia lando, kiun havas ĉiuj laboristoj, kia ajn estu la ebla milito aŭ kia ajn estu la registaro kiu tion ordonu, malhonorigas lin k eĉ pelas, al memmortigo, socialiston tiel moderan kiel Salengro.

La reganta klaso diris ĉiuforme, ke patriotismo k amo al patrolando estas plejsupera k unika devo de l' homo; malgraŭ tio la monstraĵoj, kiujn plenumas Franco en sia naskiĝlando, apenaŭ eltiris protestan vorton.

Ĉefe en Anglio oni instruas al laboristoj ke la koloraj rasoj estas nature malsuperaj k ke alirasanoj nur naskiĝis por resti subpremataj de blankuloj; spite tion, niaj ĵurnaloj dediĉis nenian komenton al la fakto ke maŭroj estas transportitaj en Madridon.

Ke hispanaj faŝistoj utiligas kolorrasulojn por murdi siajn kunlandanojn, tio ne pliigas la teruron de l' faktoj. Tamen, kiu havas ian senton pri Historio nepre emociiĝos konstatante, ke aspirantoj al regado de eŭropa lando, denove importas al nia kontinento la aziajn aŭ afrikajn idojn de popoloj, kiuj iam konkere subpremis Eŭropon. Tio signifas ke sentoj de raso k tradicio, al kiuj instigas niaj regantaj klasoj, ne posedas realan sencon; ke ili uzas rimedojn por defendo de sia mono.

Maŭraj trupoj kun italaj k germanaj aviadistoj detruas madridajn kvartalojn. Samtempe, kiam mi skribas ĉi tiujn vortojn, falas bomboj sur domojn k popolon de eŭropa ĉefurbo. Detruo de Madrido, fare de hispanaj riĉuloj k per fremdaj trupoj, lasos profundan postsignon en eŭropa historio. Ni estas multaj, kiuj anticipis la averton pri danĝero de bombardado al moderna granda urbo; scienculoj diskutis k deduktis pri neniigo de miloj da estuloj.

Tiuj anticipoj realiĝas nun k mi asertas, ke jam KOMENCIS AGONIO DE EŬROPO. Ni jam scias kion konjekti; riĉa klaso ne haltos antaŭ ia baro, eĉ malgraŭ ke tio signifos detruon de ĝia patrolando. Ni jam scias ke nur aŭdiĝos kelkaj protestaj vortoj kontraŭ tia agado.

Ni konstatu jenan fakton: laborista klaso, nur laborista klaso!, povas savi Londonon, Parizon, Berlinon, Vienon k ĉiujn eŭropajn kulturcentrojn, el la ruino kiu pezas sur Madrido nunmomente. Nur laborista klaso povas tion atingi se ĝi volas k se ĝi scias organiziĝi.

Laŭ korespondanto de «Times», la plej dikaj faŝistaj kanonoj bombardis ĉefe la konstruaĵojn de Universitata Urbo (apud Madrido), faŝistaj aeroplanoj detruis kvar preĝejojn k bruligis palacon de Duko de Alba, kiu estis la plej grava muzeo, krom tiu de Prado. Kiuj sin nomis, inter ni, zorgantoj de l' kulturo eĉ ne komentas tiajn faktojn; male, kiam alvenas sciiĝoj pri detruo de artaĵoj, kulturcentroj, pri morto de madrida popolo, kiam korespondantoj diras ke ili vidas fali el domoj kripligitaj korpoj de virinoj k infanoj, tiam Mussolini k Hitler agnoskas Franco'n kiel ŝtatestron de Hispanio.

Komprenebla estas tiu reciproka agnosko; per ĝi Franco liveras pruvon pri sia aparteno al la bando de tiuj, kiuj dronigas la patrion en sangon de l' propra popolo. Li per tio pruvas, ke li estas ja vera faŝista patrioto, inda je akcepto flanke de faŝistaj patriotoj de Eŭropo.

De antaŭ multe da tempo la konscienco de eŭropa kapitalista klaso malvivas; se iu dubas pri tio, bonvolu konstati ties silenton antaŭ madridaj masakroj. Nur laborista klaso kapablas hodiaŭ varti sentojn de homaranismo. Kiuj ne mortigis en siaj koroj tiujn homamajn elementajn sentojn, kiuj ankoraŭ kapablas indigniĝi antaŭ murdo al sendefendaj viroj k virinoj, devas aliĝi al la movado fervore organizita de la laborista klaso.



INTERNACIA KONTRAŬFAŜISTA SOLIDARO

Roto da eksterlandaj kunbatalantoj de la Internacia Brigado marŝas al la fronto

**Por uzi restintan materialon, ni aldonas eksterordinare du paĝojn al ĉi tiu numero. Jen do praktika esprimo de danko al niaj helpantoj k ankaŭ instigo, al ĉiuj ceteraj amikoj, memori konstante, ke la pano estas farita el faruno k certe ne el vanaj iluzioj...**

## Batalantino mortis...

Virinoj el ĉiuj landoj: Lina Odena mortis! Nia kamaradino, nia plej amata fratino, la kunulino de nia animo forlasis nin por ĉiam, ho ve! Ĉiam preta, afabla, ŝi estis, por ni ĉiuj, la plej bona konsolo dum la plej malfacilaj momentoj... k nun ŝi jam foriris por ĉiam de nia flanko... Ŝi mortis, sed ĉe nia koro ŝi vivos eternel Tamen, kiel malfacile, estas al ni kutimiĝi al la ideo, ke Lina Odena mortis. Ni ne povas rezigni kredi tion, ne plu vidi ŝin, ne plu aŭdi ŝian voĉon kiu parolis ĉiam pri laboro, pri organizo, pri decidigaj triumfoj sur la faŝismo!...

Lina kara!... Niaj okuloj malsekiĝas per larmoj k ni ne hontas pro nia ploro, ĉar ni ploras por Lina Odena. Lina Odena, kiu estis por ni nia plej kara espero. Lina Odena, kiu estis por ni simbolo pri la venontaj generacioj... Ŝi estis la unua ĉiam por la laboro. Lina Odena neniam malakceptis iun oferon. Ĉiam aktiva, gaja, ridanta, kun sana optimismo, eĉ antaŭ danĝero. Lina Odena dediĉis sian tutan vivon al la emancipiĝo de siaj fratinoj. Malgraŭ sia juneco, ŝi konis pri la terura trakto de la karceroj, pri la penadoj de la eksterleĝa vivado. Jam en nia glora Oktobro ŝi sciis okupi sian postenon batalante kontraŭ la malamiko kun la pafilo en la mano. Ĉe la eksplodo de ĉi tiu krima ribelo si troviĝis en la andaluzia provinco Almería kie tuj ŝi komencis kun mirinda kapablo k fervoro organizi kolonon, la kolono kiu ĉirkaŭsieĝas Granadon.

Lina Odena, ĉiam la unua por la laboro k por la ofero, por montri ekzemplon, ŝi volis ĉiam iri en la avangardo, ĝis kiam, iun tagon, ho ve! ŝi perdiĝis kun kelkaj kamaradoj k falis en la malamikajn vicojn. Ŝi ordonis al la kunuloj saviĝi k dume ŝi restus tie rezistante por faciligi ilian savon. Unuj eskapis, aliaj mortis apud ŝi... La lastan kuglon ŝi gardis por si mem! Ŝi sciis pri la barbaraĵoj de la faŝistoj k ne volis fali viva en iliajn monstrajn manojn... Ploru, ploru, virinoj, por Lina Odena k tiu ploro fariĝu indigno, fariĝu kolero por venĝi ŝin, por venĝi nian heroinon, simbolo pri l' venontaj generacioj!...

Ŝia korpo estis transportata al Granado de la faŝistoj, kiuj elmontradis ĝin kiel venkosignon...

Lina Odena: la laboristoj, kamparanoj, soldatoj, maristoj k aviadistoj kiuj batalis sub cia komando, kuntiritaj la pugnoj pro doloro, pro kolero, promesas cin venĝi.

Lina Odena! Gvido de la junularo! Mirinda ekzemplo pri heroismo, pri abnegacio: Morgaŭ, kiam ciaj murdistoj estos neniigitaj, ni promesas iri al Granado jam liberigita el la faŝista jugo, k antaŭ cia kripligita korpo ni klinigos niajn ruĝajn flagojn k ni, k kun ni ĉiuj virinoj de la mondo, memoros pri ci k cia nomo estos la flago de ĉiuj virinoj batalantaj kontraŭ la faŝismo, por la Libero!

Lina Odena, ĝis tre baldaŭ!

# KARA LEGANTO!

Spirita fadeno, inter via emocio k nia fervoro, estas ĉi tiu vigla gazeta heroldo POPOLA FRONTO, guto sinsekva de obstino tre prava, glite ruliĝanta, sur la kampo ebena de la esperantismo.

Via materia helpo jam nun estas pli facila. Nia internacia adreso en Francio garantias la akcepton poŝtmandate de viaj monaj donacoj.

Daŭre, amikoj, kolektu do monon senlace, centimon post centimo, jam tuj mem, por nia k via bulteno, kiu povos diri tre aroge, pro tio, ke neniu alia estas sia mastro krom la honesta esperantistaro de la tuta mondo!

Ne forgesu ke la nova adreso validas nur por ricevi monon. Ĉion alian, eĉ respondkuponojn, oni devas adresi al nia redakcio. Atentu bone tiun averton!

INTERNACIA ADRESO
nur por mono
FARENC GUSTAVE
56, Rue du Parc
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

REDAKCIA ADRESO
por ĉio alia
POPOLA FRONTO
Mar, n.° 25
VALENCIA (Hispanio)

## Hispana Romanco

Dediĉ. al Generalo Mangada

Suna lando de hispanoj,
Hispaninoj, verva danc',
Taŭroludoj, ŝprucfontanoj,
Romantiko de romanc'.
Son-bracelet'
Krak-kastanjet',
kaj bril'
kaj tril'
de l' ama pet'.

Pastroj, junkroj, bankieroj,
Franko, Mola, plia band'
Kun la helpo el ekstero,
Volas regi plu en land'.
Kaj jen komplot'
en tuj-eksplod'
ribel'
en ŝvel'
de l' nigra kot'.

Generaloj kur-rapidas
Respublikon murdi for,
Kaj Berlin' kun Rom' egidas
Entreprenon de l' teror'.
Tuj en aplik'
la mekanik',
risort'
de fort'
de brunsvastik'.

De Bilbao ĝis Granado
Flagras ruĝa ilumin',
Sonas pafoj, kanonado,
Flame ringas fajra vin'.
Sub suna ard'
batalbombard'
kun bru'
detru'
ribelstandard'.

Gejunuloj, maljunuloj
Kaj virinoj en egal'
Kun ekflamoj en okuloj
Iras ĉiuj al batal'.
En bato-pret'
jen bajonet'
kun bril'
armil'
de la prolet'.

La hispana Respubliko
Venkos bandojn en frakas',
Se kamparo kun fortiko
Sekvos post proleta klas'.
Nur en la lig'
estas efik'
kaj sort'
kaj fort'
de l' Respublik'.

Originale de E. MIĤALSKI

**Esperanto estas balailo por abunda rubo en la internacia gazetaro!**

# LA ROLO DE ESPERANTO

Okaze de bonintencaj, naivaj pensoj de iu kunlaboranto aŭ redaktoro de sveda gazeto «La Espero», kiu pli atentas la eksterajn signojn ol la kernon de la aferoj, iu skotlanda esperantisto, leginte la koncernan artikolon, sin kredis devigata opinii pri la rolo de Esperanto, k eligis sian penson tiurilate.

Li facile parolas pri «politikaj ekstremistoj» kiuj uzas la lingvon kiel helpilon, kio sekvigas danĝeron por Esperanto, kiu fakte jam trovis fortajn barojn en pli ol unu lando k eĉ malpermeson.

Strange estas, en la nuntempo, ke estiĝas ankoraŭ diskutoj pri esperantismo, kiel ideo-forto kapabla kunigi homojn, kies interesoj estas tute kontraŭaj aŭ kies sentoj k kredoj socipolitikaj estas absolute diferencaj, nur dank' al uzado de sama lingvo. Se homoj parolantaj la saman lingvon, nepre konsentus amike al ĉio ajn, ja ne estus konfliktoj interne de la teritorioj kies enloĝantoj estas samlingvaj. Tamen, la diversaj tavoloj de ĉiu lando ofte interdisputas k eĉ homoj apartenantaj al la sama klaso estas inter si malamikoj.

Kial la esperantistoj estus escepto? Se dekomence la lingvo estis alprenata de bonkoraj idealistoj, kiuj naive esperis tiun neefektivigeblan sukceson, tre baldaŭ Zamenhof mem konsciis pri la bankroto de tiucela entrepreno, ĉar la deziro, nobla k digna, estis senbaza pro malatento al la veraj cirkonstancoj, kiuj disigas la homojn, por kiuj la simpla uzado de komuna lingvo ne estis solvo.

Tial la movado dispeciĝis je kelkaj organizoj, laŭ celoj k aspiroj de la diversflanka esperantistaro. Ĉu ne daŭre ekzistis malkonsento inter la membroj de universalaj asocioj esperantistaj? La nova I. E. L. en kontraŭstaro al U. E. A. estas freŝa pruvo pri ĉi tio.

Zamenhof do nur povis oferti al la homaro internacian helpan lingvon, kiel komprenilon por malsamlingvanoj sen celo trudi devigon al iu ajn kredo, ĉar li konsciis pri la neebleco starigi akordon sur tiu bazo. Ni ne neas, ke ekde la momento, kiam iu homo simpatias al la disvastigo de neŭtrala lingvo, li jam estas progresemulo posedanta solidarecajn kvalitojn en principo, sen sklaviĝo al naciemaj antaŭjuĝoj, ĝenerale sed ne ĉiam, ĉar ankaŭ ekzistas esperantistoj submetitaj senrimede al superstiĉoj, kiuj baras la vojon al internacia alproksimiĝo.

Ke Esperanto celas nur esti helpilo por la rilatoj inter la diverslingvaj nacioj, evidentiĝas per la strofoj de la himno. Neniel estas en ĝi aludite, ke la lingvo pretendas eviti, ekzemple, la klasbatalon. Ekzistas sendube la Interna Ideo, kies konsisto estas mola idealismo por kontaktigi la malsamligvajn popolojn, por ke ili pli intime interkonatiĝu. En tiu senco nur povas esti uzata la esprimo «samideano» k ni pli ŝatus la vorton «samlingvano» anstataŭ ol «samideano» tial ke ĉiu havas siajn propajn k apartajn ideojn pri ĉio ajn alia krom la uzado de sama lingvo.

Ekster tiu tezo, se oni flaras danĝeron por Esperanto pro ĝia apliko al propagandado de la tiel nomataj «politikaj ekstremismoj», oni povas aserti, ke estas ekstremista reĝimo, kiu forpelas nian lingvon el sia lando, anstataŭ profiti ĝin por propagandi eksterlanden sian doktrinon k siajn «glorojn». Reĝimo, kiu tiel despote agas, bone pruvas, ke ĝi malakceptas k malpermesas la aliĝon al tiu «interna ideo», kiun ĝi juĝas malkonforma al siaj celoj. De lingva vidpunkto estus sensencaĵo malpermesi Esperanton pro la fakto, ke ĝin uzas la partianoj de kontraŭa politika doktrino. Ĉu, se tiuj lastaj uzus anglan lingvon, oni malpermesus ankaŭ la lernadon k la uzadon de la lingvo de Britio? Sekve do, ĉar la «politikaj ekstremistoj» uzas daŭre la presarton, ke la naciecaj faŝismoj ne plu uzu la presejojn. Kompreneble, en tiuj landoj, la kaŭzo de la persekutado al Esperanto estas ĝia vera «interna ideo» k nenio plu. Kredi, ke tio okazas ĉar ĝi estas lingvo vigle uzata de «politikaj ekstremistoj», ne pravas, ĉar la malpermesantoj mem ankaŭ estas politikaj ekstremistoj.

Por fini, ni menciu, ke ĉar Zamenhof donacis Esperanton al la tuta mondo k ĝi estas nenies propraĵo, ĉiu rajtas apliki ĝin al siaj privataj celoj, laŭ diras mem nia angla samlingvano en sia skribaĵo al la gazeto sveda. Esperanto povas esti uzata por ĉiuspecaj klopodoj. El tio konsistas la neŭtraleco de nia lingvo. Nek ĝi signifas politikan tendencon, nek ankaŭ iu politika tendenco povas meti ĝin je la servo ekskluziva de sia aparta celo. Mallonge, ke neniu organizo aŭ doktrino rajtas pretendi la monopolon de Esperanto.

Dum ni konstatas kontentige, ke ĝi estas obstine rifuzata de la faŝistaj ŝtatoj por ilia propagando, ni fieras uzi ĝin dorloteme por disvastigi la abomenindaĵojn de la hispanaj faŝistoj, k senmaskigi ilin k ties eŭropajn helpantojn, por ke ili estu malbenataj de ĉiu digna homo k sekve ankaŭ de ĉiu digna esperantisto.



## Ĉe la Esperanto-Neŭtraluloj

En la numero de Aŭgusto-Septembro de «Nia Gazeto» aperis traduko de intervjuo, kiun faris franca ĵurnalisto al M. de Unamuno.

Dorlotite de la Respubliko, Unamuno, kiu estas paradoksa strangulo, plena je fiero pri si mem, konvertiĝis lastatempe al la faŝismo, en kiu li subite ekvidis «la savoforton de l' civilizo k de la kulturo».

Ni, hispanoj, sufiĉe bone konas la travivaĵojn de tiu «eminentulo», ĉiam preta alĝustigi sin al la modo, ĉar mankas al li propra firma ideologio. Kredeble, lia lasta akrobataĵo estis motivigata de la hazarda fakto, ke li troviĝis, ĉe eksplodo de la ribelo, en urbo kie la perfidaj generaloj bonŝance sukcesis... Sed tio ne gravas.

Tamen, ni reliefigu tiun kvazaŭan propagandon en «Nia Gazeto» per publikigo de la intervjuo sen ajna komento, emfazante krome la gravan personecon de S-ro. Unamuno. Jen pruvo de «senpartieco» de tiu franca Esperanto-gazeto, ignoranta la malpravon k la mallojalecon de la ribelintoj k la mensogojn de Unamuno.

Bela sinteno por gazeto, kiu volas aspekti demokrata k liberala! Eble la redaktoroj de tiu neŭtrala gazeto zorgas pri simila gesto, okaze de eventuala militistara faŝista ribelo en Francio!

Sendube, tiu elmontro de simpatio al la deklaroj de S-ro. Unamuno, fare de tiu gazeto, estas «alia» faceto de la «ne interveno» laŭ demokrata vidpunkto de demokrataj esperantistoj.

Kiel statas la demokratio, eĉ en Esperantujo!

Intertempe, ni per la sperto, lernas.

# KLARIGO NECESA

Ni ricevas amason da leteroj de amikoj el ĉiuj landoj, kun tiel fratecaj esprimoj, ke ni ne povas ne emociiĝi dum ĝia legado. Kortuŝite, ni volus respondi al ĉiu, individue k rekte. Sed eĉ se ni farus tion pere de nia bulteno, necesus granda spaco, kiun ni k niaj legantoj urĝe bezonas por informoj pri nia afero.

Multaj amikoj sendas al ni salutojn k bondezirojn de asocioj k organizoj neesperantistaj. Tio ĉi postulas—ni ĝin bone komprenas—nepran specialan respondon por la koncernaj kamaradoj neesperantistaj. Ofte asocioj, esperantaj aŭ ne, deziras ke ni estu perantoj por ilia kontaktiĝo kun hispanaj studentoj, junularoj, teknikistoj, sindikatoj k eĉ kun milicanoj de la batalfrontoj!

Estu komprenemaj, kamaradoj! Ni ja travivas militon postulante al ni streĉan laboradon. La hispana popolo nun havas pezan taskon. POPOLA FRONTO ne estas redaktata de profesiaj gazetistoj. La redaktoroj k prizorgantoj de ĉi tiu revueto estas simplaj laboristoj, kiuj post sia longa taglaboro en fabriko, partio aŭ sindikato, eĉ post milita ekzercado, ĵetas sur siajn ŝultrojn kroman ŝarĝon, forŝtelante tempon al ripozo... Ni bedaŭras ne povi atenti ĉies dezirojn.

Post la popolfronta venko en Hispanio, Esperanto plenumos gravan rolon por la interrilatoj de la tumondaj kamaradoj kun la hispana popolanaro. En la nuntempaj cirkonstancoj pli urĝaj bezonoj malhelpas dediĉi niajn klopodojn al tiu celo.

Jen estas la klarigo, kiun ni ŝuldis al kelkaj el niaj estimataj korespondantoj el preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo.

# KATOLIKA HISPANA VOĈO

**La faŝistoj — deklaras S-ro. Irujo—fusilmortigis dek ok pastrojn.**

La katolika ministro en la hispana registaro S-ro. Irujo (ĉar ankaŭ estas katolikaj ministroj en Hispanio nuntempe, kune kun respublikanoj, socialdemokratoj, komunistoj k anarkistoj) en la daŭro de intervjuo kun iu ĵurnalisto, deklaris:

«La kulturaj problemoj en nia regiono (Baskaj Provincoj) elvolviĝas sur la bazo de profunda religieca sento de la tuta popolo k sen batalemo kontraŭ la pastroj. Klerikalismo en mia lando ne estas afero ekskluziva de riĉuloj k senopukuloj, ĉar la pastraro mem eliĝas el la humilaj klasoj, fakto kiu okazigis, kompreneble, demokratan orientiĝon.

La episkopo de Vitoria, filo de simpla ŝafgardisto estis forĵetita el sia diocezo de la faŝistoj. La episkopo de Pamplona, filo de laboristo mortinta en laborakcidento, estis arestita de la faŝistoj k dek ok pastroj estis fusilmortigataj. Tiuj krimoj k faraĉoj estas faritaj, ĉar la viktimoj rifuzis meti la religion en la servo de la politiko, la popolo plene respektis ĝin en tiuj ĉi revoluciaj momentoj. Al ni, la religio, ne malpermesas kunvivi k kunlabori kun la komunistoj k la socialistoj tiel en la regiona kiel en la landa registaroj.»

Ni rekomendas tiujn vortojn al la blindaj katolikoj eksterlandaj k petas ilin primediti la ekziston de katolikoj en la «ruĝa» registaro hispana.

Kaj nun, legu:

La korespondanto en Gibraltaro de la angla ĵurnalo «Daily Telegraph» informas sian gazeton pri la pafmortigo al iu pastro, kiu petis de generalo Queipo de Llano ke li malpliigu la nombron da mortkomdamnoj.—«Malĝojigas mian koron—li diris esti devigata sakramenti tiom da filoj de la Eklezio». Queipo respondis nenion. Sed morgaŭe, la pastro estis ekzekutata, post ruze aranĝita speco de juĝado por ŝajnigi, ke li estas simpatia al «ruĝuloj».

Io simila okazis en La Linea al du enterigistoj. Ili diris al la faŝistoj, ke estas terure enterigi personojn ankoraŭ vivantaj. Ili petis al la ekzekutantoj bone plenumi la rolon. La sekvo de tiu peto estis la mortigo por ambaŭ enterigistoj.

Ne estas ni, «ruĝuloj», sed la korespondanto de la angla «Daily Telegraph» kiu raportas.

# Religiaj Bagateloj

Makleristo Luis Sanchez, kiu loĝis en Burgos k hazarde estis en Valladolid kiam komencis la ribelo k poste fuĝis tra Galicio, venis al Katalunio kie oni parolis kun li.

Li diras, ke sub la gvidado de la episkopo oni organizadis la persekutadon al laboristoj, k oni fusilmortigis tiujn, kiuj kunportis membrokarton de iu laborista organizo.

Poste, ĉar ili bezonis virojn, la episkopo publikigis manifeston per kiu li vokis la virojn al la laboro k promesis indulgon. Per ĝi li senkulpigis la unuajn krimojn, kiuj estas faritaj «pro la ekscitiĝo de la unuaj momentoj». Ĉar neniu alvenis volonte oni serĉis ilin k murdis kiujn ili trovis.

En la subteraĵoj de la katedralo de Burgos oni magazenis municion k armilojn kiujn ili komencis tuj ricevi konstante k grandkvante.

Ĉar viroj forestis, la pastroj mem prenis fusilojn k iris en la tranĉeojn.



FAZO DE BATALO EN LA ANTAŬURBO DE MADRIDO.
Registara Artilerio efike funkcias

## GRAVA RIMARKO

Ni liveras rekte nian bultenon al ĉiuj landoj krom Germanio, Italio k Portugalio; kun ĉagreno ni ne povas, sen danĝero por ili, starigi senpere kontakton kun multaj amikoj el tiuj tri por ni malamikaj nacioj.

Ĉiuj niaj legantoj, en aliaj landoj, devas lerte k sagace zorgi por havigi nian gazeton al honestaj esperantistoj el la cititaj faŝismejoj. Skribu al ni pri via eblo fari tion, ni sendos tiucele plian ekzempleron al tiuj dankindaj helpantoj, kiuj ankaŭ povus esti perantoj por poŝtaj rilatoj.

Jen delikata laboro, kies plenumo, post atenta studo k ruza efektiviĝo, estos nova sukceso en tiu grava aspekto de nia lukto kontraŭ la faŝismo.

Primeditu jam tuj k starigu planon!

**AŬSKULTU RADIODISSENDOJN DE VALENCIO PRI HISPANA SITUACIO EN ESPERANTO!**

Stacio de Komunista Partio—ondlongo 41,87 metroj—marde k vendrede je la 17ª horo (hispana tempo)

Stacio de C. N. T.-F. A. I.—ondlongo 42,40 metroj—lunde k vendrede je la 19ª horo (hispana tempo)

La socialista Stacio provizore ne funkcias

# AL INTERNACIA LABORISTARO

KAMARADOJ!!

Nun, kiam la faŝismo, je la servo de la kapitalismo, murdas senkompate infanojn, virinojn, maljunulojn k laboristojn de nia lando, aperas denove en horizonto la fantomo de nova monda milito, la kapitalistoj intencas revivigi la ankoraŭ tro proksimajn tagojn de l' jaroj 1914-18. Ĉar ili konstatas, ke spite la helpo kiun ili ricevis de faŝistaj k tiel nomataj «demokratiaj» landoj, la friponoj ne sukcesas venki nin, nek malkuraĝigi nian popolon, ĉi tiu milito, provokita de l' perfidaj generaloj je la servo de Mussolini k Hitler, baldaŭ pligrandiĝus k fariĝus MONDA MILITO.

Sed vi, niaj klasfratoj, devas eviti tion!

Vi ne akceptu trompigajn mensogojn, kiel en 1914, kiam vi mortigis viajn klasfratojn de aliaj landoj, trompitaj de samspecaj demagogoj, kiam vi mortpafis unuj la aliajn.

Se oni diras al vi, ke ni malamas vin, ke ni kontraŭbatalas vin, leviĝu k protestu ĉar hispanaj laboristoj, per nuna lukto, montras sian amon k helpon al tutmunda laboristaro. Ni havas samajn mizeron, doloron, koleron, nin ekspluatas k sklavigas sama forto, kiun ni intencas detrui por liberigi ĉiujn popolanojn de la mondo.

KAMARADOJ! Eble Eŭropa milito eksplodos. Ne prenu armilojn por kontraŭbatali viajn klasfratojn, ĉu hispanaj, ĉu el alia lando. Nur prenu ilin por lukto kontraŭ faŝismo, kiu mizerigas nin, kiu ekpluatas nin, kiu deziras nin dronigi en nian propran sangon.

Hispana laboristaro montris al vi ekzemplon. Fariĝu indaj je ĝi.

POR NIA PLENA LIBERO! VIVU LA INTERNACIA POPOLA FRONTO!

## NIA MUNICIO

| | |
|---|---|
| Valencia Esperantistaro. . . . | 217 ptoj. |
| H. B.—Annecy . . . . . . | 50 ffr. |
| D. v. d. K.—Amsterdam . . . | 1 dol. |
| K. N.—Trelleborg . . . . . | 5 svkr. |
| G. Y.—Stockholm. . . . . | 5 svkr. |
| M. B.—Tárrega. . . . . . | 10 ptoj. |
| F. L. E.—Sekcio 4 Amsterdam. | 50 ffr. |
| M. H.—Malmo . . . . . . | 5 svkr. |
| M. N.—Kovsta . . . . . . | 5 svkr. |
| H. R.—Varberg. . . . . . | 5 svkr. |
| G. N.—Stockholm. . . . . | 5 svkr. |
| F. L. E.—Distrikto Amsterdama. | 50 ptoj. |
| J. P.—Plzeň . . . . . . . | 50 ckr. |
| Lab. Esp. Grupo.—Preston . | 2'5 sil. |
| H. J. N.—Hago. . . . . . | 25 guld. |
| J. H.—Huidonsy . . . . . | 10 ckr. |
| R. K.—Clarson. . . . . . | 1 dol. |
| J. S.—Quaregnon . . . . . | 5 bfr. |
| Familio B.—Paris. . . . . | 50 ffr. |
| J. B. Pak.—Rotterdam . . . | 1 dol. |
| K. G. I. long.—Amsterdam. . | 10 guld. |
| E. Ostedberg.—Härnösand . | 5 svkr. |

La sekvantaj K-doj: W. Ch. Edinburg; E. L. O. London; J. S. Poruba; F. J. Aneby; D. B. Manchen; B. B. B. Bradford k W. Koopman anoncis al ni monsendon, sed tio ne trafis nin, eble ĉar ili trovis malfacilaĵojn por sendi monon al Hispanio, ni restos tre dankemaj al ĉi tiuj k-doj. k ankaŭ al multaj aliaj, kiuj demandis al ni kiel fari la alsendon, se ili bonvolas nun sendi la donacon al nia Peranto en Francio, kies adreson ili trovos aliloke.

Krom la supremenciitaj monsendoj, ni ricevadas en ĉiuj leteroj multajn respondkuponojn, pri kiuj, bedaŭrinde, ne eblas kvitanci, ĉar tio plenigus certe tutan paĝon de bulteno. Sed, ankaŭ al tiuj «anonimaj municiintoj» ni deziras esprimi nian tutkoran dankon!

Kamarado! Tiom ni jam hardiĝis en la batalo, ke ne plu ni timas bombojn; sekve, bombardadu senĉese la deponejon de «Nia Municio».

LA ADMINISTRACIO

## Lasthora Impreso

Daŭras la ĉefa atento de nia milito en la Madrida fronto, kie la malamiko akumulis siajn plej bonajn armilojn. La popola armeo, kun obstino k konscia disciplino defendas sian ĉefurbon k detruas la planojn k manovrojn de multaj diplomatoj celantaj, imite al fasistaj landoj, agnoski la ĵurrompintojn kiel «leĝajn gvidantojn» de Hispanio.

En la altaj internaciaj medioj oni babilis pri la eblo starigi interkonsenton pri referendumo inter la du partoj. Tio estas plene rifuzata de la popolo, kiu konsideras, ke estas moko doni trakton de egaleco al perfiduloj, kiam tiuj jam flaras fiaskon.

La trajto k aspekto de niaj frontoj k ariergardo akiras jam konturojn de respondeco k kompreno pri la grava senco de nia batalo.

Neniu dubas jam pri la venko!

## HEROO FALINTA

Unuavice, pro kuglo en la koro, mortis dum batalo en Madrida fronto, internacia heroo, k-do. Hans Baimler, eksa germana deputito k membro de le Centra Komitato de germana Kompartio. Lia aktiva partopreno en la hispana milito kontraŭ la faŝismo estas pruvo pri la signifo internacia de nia lukto, kiu rompos la katenojn ankaŭ al germana popolo!

Kun tiu iluzio ni daŭre batalas!

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia

## POPOLFRONTA LETERUJO

P. K.—Novorossijsk.—Kun danksento ni konstatas vian viglan agadon.

K. G.—Paris.—K-do. P. Sch. fartas bone en Orihuela (Alicante).

J. B.—Zaandam.—Laŭ via peto, ni kvitancas ses respondk.

V. W.—Bruselo.—Ni laŭdas vian laboron k eventuale profitos je via propono.

L. A.—Ymuiden.—Vi nepre ricevos nian bultenon. Pri via deziro, ni diskonigos ĝin.

M. K.—Oxford.—Viaj sendaĵoj meritas nian atenton. Bv. transdoni al ne-esperantistaj k-doj nian dankon, ĝis alvenos pli bona epoko por ke ni peru laboristaran interkontaktiĝon.

S. J.—Pézénas.—Ni provas akiri informojn pri tiu volontulo k se ni sukcesas ricevi ilin, tuj sciigos vin.

F. de V.—Amsterdam.—La koncernajn leterojn ni transsendis al via korespondanto, kiu esperebIe respondos al vi.

M. R. L.—Zwolle.—Ni scias, ke k-do. Monleón bonfartas k se ni havas okazon renkonti lin, ni informos lin pri via demando.

J. Sch. Haarlem.—Vi povas sendi monon per nia Peranto en Francio.

H. B.—Annecy.—Via monsendo bonorde alvenis k ni kordankas ĝin k viajn afablajn vortojn.

E. P.—Tallinn.—Kompreninte bone la situación, ni varme dankas vin pro viaj amikecaj esprimoj.

A. E.—Archamgelsk.—Vian leteron ni legis kun ĝojo k ni faros la eblon rilate al via peto.

V. van M.—Amsterdam, k aliaj.—Bedaŭrinde ni ne povas komplezi vin ĉar la unuaj du numeroj de «P. F.» tute elĉerpiĝis.

I. P. C.—Edinburgh.—Ni notas kun danko viajn indikojn k adresojn k transsendis tuj la enmetitan leteron.

L.-Taks.—Esp. Grupo Londono.—Via tre interesa letero bone trafis nin. Koncerne monsendaĵojn, prefere uzu la servon de nia Peranto en Francio. Antaŭdankon!

F. L. E.—Sekcio 15-Rotterdam.—Dankon pro via mondonaco. Ni plenumos la mendon.

G. I.—Stockolm.—Dankon pro la sendita municio.

L. E. G.—Lyublyana.—Ĉion ni ricevis k dankas.

K. B.—Bogorodosk.—Ni dubas ĉu ni iel ricevos viajn kvin rublojn. Kiam k kien vi ilin forsendis?

J. K.—Leningrad.—Vian multpaĝan sendaĵon ni kiel eble plej taŭge profitos laŭcele. Koran dankon pro viaj klopodoj!

Ja. B.—Leningrad.—Estonte ni aranĝos kun via lando pere de vi k de similaj amikoj amasan korespondadon, sed nun via propono ne estas efektivigebla pro la malfacilaj cirkonstancoj.

E. L. O.-Ealing, London. Ni notas la adresojn k esperas ke vi iel sukcesos subteni nin. Via monsendo ankoraŭ ne venis.

F. J.—Anebey.—Ni atendas sciigojn de vi.

J. S.—Poruba u Orlove.—Same ni diras. Ĝis nun ne trafis nin via monsendo, pri kiu ni erare jam kvitancis.

W. K.—Armeersfort.—Ankaŭ ne estas ricevita la mono, kies sendon vi anoncis.

B. B. B.—Huddersfield.—Ankoraŭ ni ne ricevis vian anoncitan monsendaĵon.

D. H.—Mon.—Via mono ankaŭ ne falis en niajn manojn ĝis nun. Bv. informi nin pri tio.

Sekcio 10-a. F. L. E.—Amsterdam.—Kiel petite de vi, ni konfirmas la ricevon de 15 respondk.